



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Aprilo 2016 n-ro: 4



## Saluton!

Ĉi tiu estas la kvara numero de nia revueto. En ĉi tiu numero leginda kaj kortuŝa estas la ĉina rakonto "La Lasta Milita Elefanto". Bonvolu provi legi ĝin. Plue en la 14-a de aprilo estas la mortodatreveno de nia Majstro kaj pro tio ni prezentas la legaĵon "La Majstro Mortis!" kiu ankaŭ estas leginda teksto.

Nia amiko Fons Doomen kiu loĝas en Alanya urbo rakontas pri kiel ili decidis veni el Nederlando kaj fariĝi loĝantoj de Turkujo. Eble rakonto en simpla lingvo por komencantoj.

Ekde nun la dua paĝo, la malantaŭa paĝo de ĉi tiu, estos pli malpli rezervita por editoraj aĵoj kiel enhavtabelo, mesaĝo al legantoj, kontakt-adresoj ktp. Plue ni provos eldoni nian revueton en nombro da paĝoj dividebla per kvar (ekz. 16, 20, 24, 28, 32) por ke vi povu pinti ĝine A5 formato kiel libreto por pli facila legado kaj konservado.

Bonvolu skribu al ni...

**Bonan legadon al ĉiuj!**

## Merhaba!

Bu dergimizin dördüncü sayısı. Bu sayıda dokunaklı ve okunması gereken Çin'den "Son Savaşçı Fil" hikayesini yayınlıyoruz. Lütfen okumaya çalışın. Bundan başka 14 Şubat günü Usta'mızın ölüm yıldönümü ve bunun için size "Usta Öldü!" adlı yazıyı sunuyoruz ki bu da okunması gereken bir yazı.

Alanya'da yaşayan arkadaşımız Fons Doomen bize Hollanda'dan çıkıp Türkiye'de yaşamaya nasıl karar verdiklerine dair hikayesini yazdı. Basit dilde yazılmış başlangıç seviyesinde olanlara uygun bir hikaye olabilir.

Bu sayıdan itibaren ikinci sayfayı editoryal konulara ayırıyoruz: içindekiler, okuyuculara mesağ, iletişim adresleri vs. Bunun dışında dergimizi artık dördün katları olan sayfa sayısında (16, 20, 24, 28, 32 gibi) çıkarmaya çalışacağız ki okunması ve saklanması daha kolay olacak şekilde A5 formatında kitapçık formunda yazıcıdan yazdırılabilsin.

Lütfen bize yazın.

**Hepinize iyi okumalar!**



**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Saluton!	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA novaĵoj	3
TEJO novaĵoj	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Nova kurso de Esperanto ĉe Memrise	4
Esperanto-Lernejo ĉe "Lingvo-Studio"	5
Kastelo Gresilion invitas	5
Tago de la Gepatra Lingvo	6
Internacia Tago de Virinoj	7
La Majstro Mortis!	8
Poemoj de Konuralp	10
Legajo - Kafka: Antaŭ la Leĝo	11
Nederlandano en Turkujo	12
Legajo - La lasta milita elefanto	13
Gramatiko	16
Portreto - Stano Marček	17
Mirinda Lviv	18
BET-52	18
Libro Kritiko - La eta princo	19
101a UK - aliĝintoj el Turkujo	19
Legajo - La eta pianisto	20
Mallonga Historio de Filozofio (3)	22
Interncia Kalendaro	23
Nova redaktoro por la revuo Esperanto	23
Kuiru kun mi	24
Karavano al la 102-a UK	25
Franca Nacia Kongreso 2016 - Marsejlo	25
Le Monde diplomatique	25
Kio estas AdE	26
Krucvort-enigmo (facila)	26
Poemo	27
Ŝercoj!	27
Esperanto Kurso 4	28
Esperanto Kurso ĉe Duolingvo	28
Printempo (poemo de Hans-Georg Kaiser)	29
La 9-a Mezorianta Kunveno	29
Malfermo	30

## Kursoj



### 1) Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto.

La kurson gvidas Murat Özdizdar kaj Vasil Kadifeli. En la dua periodo post la lernejaj ferioj du novaj lernantoj aliĝis la kurson. Okan Ünlü kaj nia nova amiko iranano Ali Abbasabad.

### 2) Kurso por komencantoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul.

La kurso daŭras sukcese kaj la gvidanto estas Murat Özdizdar.

### 3) Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo.

La kurson gvidas Utku Gürdal. En la dua periodo de studado nur 3 lernantoj de la antaŭa grupo partoprenas la kurson. Tamen nuntempe estas 7 novaj studentoj kiuj aliĝis la lernadon kaj Utku sekvas iomete liberan kurs-programon por ke li ne ĝenu la kursanoj.

## STUDO RADIO-TELEVIDO EN ESPERANTO

Prezentas

### GAZETARA TRARIGARDO

<http://novajhoj.weebly.com/gazetara-trarigardo.html>



### Malnovaj numeroj estas elŝuteblaj el:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuet/>

### Konatiĝu kun turkaj esperantistoj ĉe:

<https://web.facebook.com/groups/7121509722/>

### Kontak- adreso:

[vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Ni atendas leterojn de niaj legantoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Esperanto-Sumoo



### Rezulto de la januara Esperanto-Sumoo

En la januara Esperanto-Sumoo partoprenis 277

legantoj el 29 landoj, la plej granda en nia historio. Perfektaj venkintoj (15 venkoj) estis 238 el 277 (85,92%). Kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 20,000 kaj averaĝe unu homo legas 70 paĝojn dum 15 tagoj.

El Turkujo partoprenis kvar legantoj (Fatih Emre Can, Mehmet Fatih Yüce, Konuralp Sunal, Vasil Kadifeli) kaj ĉiuj venkis ĉiujn 15 tagojn kaj gajnis diplomon.

La marta Sumoo okazis ekde la 13-a ĝis la 27-a de marto dum 15 tagoj. Ni informos vin pri ĝiaj statistikoj en la venonta revueto.

La maja Sumoo okazos inter la 8-a ĝis la 22-a de majo.

Bonvolu aliĝi kaj legi kune kun Esperantistoj de la tuta mondo. Vi povas legi kion ajn vi volas kaj eĉ po unu paĝon tage. Ne estas limo por partopreni en la Esperanto-Sumoo. Tio kio gravas estas legi por plibonigi vian lingvan nivelon kaj helpi la Esperanton kulturon kreski.

Por pli da informoj vizitu la retejon de la Sumoo kies ligilo estas :

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

La ligilo por la facebook grupo de la Sumoo, "Esperanto-Sumoo" estas :

<https://web.facebook.com/profile.php?id=759066970888217>

**Ne forgesu aliĝi!**

## UEA



N-ro 605 (2016-02-23)

### UEA PLANAS AĈETI LOĜEJON POR VOLONTULOJ EN ROTERDAMO

La Estraro de UEA planas aĉeti loĝejon kun pluraj dormoĉambroj por volontuloj en Roterdamo. Momente ne eblas akcepti volontulojn facile, ĉar dormospaco en la Centra Oficejo estas tre limigita kaj hoteloj estus tre multekostaj. Tamen volontulaj laborfortoj sur la diversaj agadkampoj de UEA estas nepre bezonataj, kaj multaj junuloj, mezaĝuloj aŭ pensiuloj pretas labori volontule por UEA en Roterdamo dum kelksemajna aŭ kelkmonata periodo. Por financi la aĉeton de volontula loĝejo, la Estraro lanĉas tutmondan donackampanjon.

N-ro 607 2016-02-29

### NOVA REDAKTORO POR LA REVUO "ESPERANTO"

El ses kandidatoj por sekvi Fabrício Valle kiel redaktoro de la revuo Esperanto, la Estraro de UEA elektis Attila Kaszás (47). Li estas diplomita esperantologo, historiisto, politologo kaj li laboras en Budapeŝto kiel konsultanto kaj manaĝisto. Ni estas tre feliĉaj pri la kvalito de la homoj, kiuj proponis sin por tiu grava rolo, komentas la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. Denove nia komunumo montris, kiom da talentoj ĝi daŭre sukcesas nutri. La redaktoro estas ŝlosila ano de nia teamo en la Estraro kaj Oficejo, kaj mi antaŭvidas ke Attila plurflanke kontribuos al niaj laboroj por la renovigo de la Asocio.

<http://uea.org/aktuale/komunikoj>

## TEJO



N-ro 422 (2016-03-04)

### KANDIDATIĜU POR ESTI KOMITATANO B

#### DE TEJO

En 2016 okazos elektoj por Komitatano B, kiu reprezentas la individuajn membrojn de TEJO en la komitato. Ĉiu membro havas pasivan kaj aktivan voĉdonrajtojn. Ĉi-foje estos elektitaj kvin komitatanoj B, unu po ĉiu komencita centoj da individuaj membroj. Por eniri la Komitaton estas bonvenaj aktivuloj de Landaj Sekcioj aŭ lokaj grupoj, kiuj laboras por la evoluo de la organizo.

#### FILMKONKURSO PRI AMIKECO EN LA UK

Universalaj kongresoj estas bona okazo por renkonti geamikojn kaj ekkoni novajn. Cele al prilumo de tiu aspekto de la kongresa vivo, kadre de la Semajno de Internacia Amikeco UEA okazigas konkurson pri amatoraj filmoj traktantaj tiun fenomenon. Tiuj, kiuj venkos ricevos senpagan kongresaliĝon por siaj amikoj.

#### TEJO SUBSKRIBIS LETERON POR PLEDI FAVORE AL LA SCHENGEN-PRINCIPOJ

TEJO subskribis leteron al la Eŭropa Konsilio por pledi favore al la Ŝengen-principoj kun 15 aliaj internaciaj junularaj organizoj ĉar TEJO celas "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo" kaj libera moviĝeblo en la Ŝengen-landaro estas grava afero por TEJO kiel internacia organizaĵo.

<http://uea.org/aktuale/tejo>  
<http://tejo.org/>

## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Saluton,



Mi finfine legis la plejparton de la marta numero. La kvalito de la revueto pliboniĝas numeron post numero; gratulon! Evidente, artikoloj verkitaj de eminentuloj kiel Renato Corsetti kontribuas al la kvalito kaj la interesigeo de la revueto. Mi esperas

ke vi povos trovi tiajn artikolojn; tian verkojn oni ne povas facile trovi. Mi ne legis la tutuon de ĝi sed mi ŝatis la "aldonaĵon", kiu temas pri Umberto Eco. Eble vi devus konsideri havigi tian sekcion (simile al ĉi-intervjuo) kiu enhavus novaĵojn aŭ intervjuojn, kiuj havas gravecon en Esperantujo. Antaŭe mi planis rekomendi al vi, ke povus esti bona ideo forigi la kurson, sed evidente ĝi eble multe valoras por oni, kiuj ĝin trovas utila.

Parenteze, la komenco de marto ne estas triono de jaro. Ne eĉ 1/4, ĝi vere estas nur sesono! :-)

Ege Madra (8/3/2016)



Saluton



Me estas leganta la martan eldonon de la revuo kiun mi multe ŝatas. Ĝi ne nur donas bonan ideon pri la eblecoj de la lingvo internacia, precipe por novuloj, sed ĝi ankaŭ inspiras min en la lernado de la turka lingvo. En artikolo kiel 'ni legu kune' mi trovas multe da vortoj

kiujn mi ankoraŭ ne konas en la turka, kvankam mi studas tiun lingvon jam dum longa tempo - mi devas diri kun moderaj rezultoj. Por mi kaj ankaŭ por mia edzino la turka estas tre malfacila lingvo. Mi sufiĉe bone parolas kaj skribas la anglan, francan, germanan, Esperanton, krom memevidente mian gepatran lingvon la nederlanda, sed tamen studi la turkan estas tre peniga kaj senkuraĝiga afero.

Ĉiuokaze mi vin sendas duan artikoleon, Nederlandanoj en Alanya, eble taŭga por la maja eldono de Turka Stelo.

Ĝis baldaŭ!

Fons Doomen (Alanya)


## Nova Kurso de Esperanto el la turka ĉe Memrise retejo



memrise



Esperanto Temel Kurs (Sesli)



Kiam mi unue uzis Memrise, kiu estis elektita kiel bona aplikaĵo pri lingvo-lernado en la jaro 2015, mi eksciis ke ĝi funkcias bone kaj helpas bone enkapigi novajn vortojn por la lernanto.

Mi kaj Utku Gürdal (turka matematikisto) pensis ke Memrise estis bona oportuno por disvastigi Esperanton en turka medio, ĉar ĝin uzas milionoj da lernantoj. Tiel, ni decidis krei komencantan, bazan Esperanton kurson en ĉi tiu retejo. Do, ni kreis la kurson bazita sur Memrise-bazaj-kursoj, ekzemple "Lernu la bazan italan" ktp.

Ĉi tiu kurso estas por komencantoj kaj ne tre instruema. Ĝi enhavas 300 frazojn, kiuj povus doni kapablon al la lernanto esprimi sin almenaŭ baznivele. La frazoj estas utilaj, ĉiutagaj frazoj.

La kurso estas ankoraŭ nekompleta. Ĉar mankas volontuloj, kiuj povos aldoni voĉojn al la frazoj. Ni ŝategus tion mem fari, sed niaj voĉoj ne taŭgas por tio. Ankoraŭ mankas notoj, kiuj provizos klarigojn kaj rememorigojn pri la frazoj.

Post kiam la kurso estos kompleta ni konigos ĝin en Facebook-grupoj por ke multaj homoj eksciu pri ĝi.

La nomo de la kurso estas "**Esperanto Temel Kurs (Sesli)**" kaj ĝia ligilo estas :

<http://www.memrise.com/course/965607/esperanto-temel-kurs-sesli/>

Fatih Emre Can

## Esperanto-Lernejo ĉe "Lingvo-Studio"



### PLI OL 170 KURSANOJ ĈE LINGVO-STUDIO EN BUDAPEŬTO

La nova jaro portis sukceson kaj ĝojigan rezulton por nia budapeŝta lingvolernejo Lingvo-Studio. En la unuaj du monatoj finiĝis tri Esperanto-kursoj kaj startis kvar novaj, ĉiuj po 14 lernantoj! Kun la pli frue komencitaj grupoj do en la klasĉambraj kursoj studas nun ĉe ni pli ol 70 homoj!

Simile sukcese startis la jaro ankaŭ ĉe la interreta lernejo. Ĉe Lingvo-Studio ni funkciigas PAGAN interretan Esperanto-kurson ("Lernu" estas iom simila al nia kurso), en tiu ĉi jaro aliĝis al ĝi kromaj 114 lernantoj, do en tiu ĉi jaro - dum la unuaj du monatoj - komencis lerni Esperanton ĉe ni entute ĉirkaŭ 170 homoj!

Lingvo-Studio estas unu el la plej grandaj lingvolernejoj en Esperantujo. La instruado okazas en tri lernoĉambroj en la Budapeŝta Esperanto-Centro, situanta en la centro de la urbo, tuj apud la metrostacio Klinikák. En la Lernejo laboras 4-5 instruistoj laŭ kontraktoj. La kursoj okazas en la vesperaj horoj.

En la lernejo ni uzas propre verkitan kaj eldonitan, (ĉu plej?) kompleksan instru-pakaĵon kun lernolibro de Szilvási, ekzerco-kajero, sonmaterialoj, komputila ekzerco-programo, interreta ekzerca programo, hejmtasko-folioj, krucvortenigmo, videaj filmetoj, muziktekstoj, ktp.

Novaĵo, ke en februaro ni lanĉis ankaŭ novtipan grupon: 2-3 monata SENPAGA kurseto por refreŝigi la lingvoscion por tiuj niaj eksaj kursanoj, kiuj pli frue jam sukcese pasis la lingvoekzamenon. La kurseto estas tre bonetosa, kaj ĝi donas la esperon enigi la grupanojn en la Esperanto-movadon...

Sukceso de nia lernejo estas dankenda ĉefe al niaj instruistoj, kiuj faras sian laboron en alta profesia nivelo: Baloghné Fodor Éva, Berényi Csilla, Nagy Márk, Tóth Mária, Tötösné Gados Zsuzsa, Sz. Horváth Kata kaj aliaj.

Retejo de niaj lingvokursoj (klaku tie al la verda eo-flago): <http://www.eszperanto-tanfolyam.hu>

Szilvási László

## Kastelo Gresillon invitas



### Francaj kasteloj kaj verkistaj rezidejoj: turisma semajno kun profesia e-ista ĉiĉerono je 2016-junio-12/17

Post nia sukcesa ekskurso antaŭ la UK en Lille, Catherine Kremer kaj Jannick Huet proponas al vi, scivolemaj Esperantistoj, novan turisman programon en la Luar-Valo. Ni vizitos per profesia ĉiĉerono en Esperanto ne nur famajn Renesancajn Kastelojn sed ankaŭ rezidejojn de la verkistoj Ronsard, Rabelais, Balzac kaj Leonardo Da Vinci.

Aliĝu nun al nia turisma semajno 2016 en junio per [www.gresillon.org/s1](http://www.gresillon.org/s1)

Atentu, la kastelo Gresillon havas malmulte da unulitaj litĉambroj, do ne prokrastu vian aliĝon se vi deziras tian litĉambron!

**Novajo:** por atingi Gresillon facile: flugo de British Airways el London City (LCY) al Angers Loire (ANE) lunde 13an de junio por 76 £. La flughaveno situas je 15 km de Gresillon kaj ni povos veturigi vin.

Koran bonvenon en la Esperanto-Kastelo



### MESAĜO DE IRINA BOKOVA POR LA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO

21-a de februaro 2016

En 2016 la temo de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo estas:

Kvalita edukado, lingvo(j) de instruado kaj rezultoj de lernado.

Tio emfazas la gravan rolon de la gepatraj lingvoj en la strebado al kvalita edukado kaj lingva diverseco, celante la realigon de la nova programo de "Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo".

La 4-a punkto de la celoj de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo enfokusigas kvalitan edukadon kaj lernadon dum la tuta vivo por ĉiuj, por ebligi al ĉiu virino kaj viro la akiron de kompetentoj, konoj kaj valoroj, permesantaj al ili la realigon de siaj vivceloj kaj plenan partoprenon en la socia vivo. Tio speciale gravas por knabinoj kaj virinoj, samkiel por minoritatoj, indiĝenaj popoloj kaj vilaĝanoj. Tio aperas en la programo de Unesko Agadkadro Edukado 2030, la realiga plano de la Celaro 2030, kiu instigas al la uzo de la gepatra lingvo en instruado kaj lernado, same kiel al la subteno kaj konservado de la lingva diverseco.

La multlingveco estas esenca por la antaŭenigo de tiuj celoj – ĝi estas nemalhavebla antaŭkondiĉo de la sukceso de la Celaro 2030, koncerne interalie kreskon, laboreblojn kaj sanon, realigon de daŭripovaj konsumado kaj produktado, kaj rilate al klimatsanĝo.

Unesko same atentis pri la defendo kaj antaŭenigo de lingva diverseco en la Interreto, subtenante la kreadon de lokaj publikaĵoj kaj instruadon pri amaskomunikado kaj informado.

Per sia programo Lokaj kaj indiĝenaj kono-sistemoj (LINKS) Unesko elstarigas la gravecon de la gepatraj kaj lokaj lingvoj, kiel iloj konservantaj kaj diskonigantaj la sciojn kaj kulturojn indiĝenajn, kiuj estas grandaj fontoj de saĝeco.

El multlingva vidpunkto la gepatraj lingvoj estas esencaj eroj de kvalita edukado, kio mem estas la bazo por la kapabligo de la individuoj kaj de ilia socio. Ni devas agnoski kaj subteni tiun potencon, por ellasi neniun kaj konstrui estontecon pli justan kaj daŭripovan por ĉiuj.

Ĉi tiu estas la mesaĝo de Unesko okaze de tiu ĉi Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.

Irina Bokova

Ĝenerala Direktoro de Unesko

Trad. Stefano Keller, estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj

Retejo kun diverslingvaj afiŝoj kaj klarigaj tekstoj pri la Tago: <http://www.linguistic-rights.org/21-02-2016/>



Vizitante Nitron, eĉ antaŭ la kongreso, vizitu ankaŭ la turistan informcentron kie sur reklamiloj vi trovos menciojn pri la UK 2016.

Sur la libromarkilo, kie estas notitaj la plej gravaj enurbaj okazaĵoj en la 2016-a jaro, trovu ankaŭ UK-n kaj ĝian logotipon!

La logotipo de la 101-a UK aperas ankaŭ en kalendareto kaj la tempo de UK 2016 estas markite verde!

La urbo Nitro vere kunlaboras kaj helpas pri informado pri la UK kaj Esperanto. Helpu ankaŭ vi varbi kaj reklami UK-n. Indas partopreni!

>>>>>



Internacia tago de virinoj (aŭ virina tago) estas la 8-a de marto ĉiujare. Tiu ĉi tago estas grava festotago pri la atingitaj ekonomiaj, politikaj kaj sociaj rezultoj de virinoj. Oni ankaŭ rememoras tiun tagon pro la incendio en la Fabriko Triangulo (en Novjorko, Usono, 1911), kie perdis la vivon pli ol 140 virinoj. La ideo pri tiu festotago estiĝis ĉe trapaso de la 20-a jarcento, kiam la rapida monda industriiĝo kaj ekonomia ekspansio kondukis al protestoj por pli bonaj laborejaj kondiĉoj.

**Mito**

Laŭ iu mito, virinoj de la vestaj kaj teksaĵaj fabrikoj protestmarŝis la 8-an de marto 1857 en la urbo Novjorko. La laboristinoj protestis kontraŭ la mizeraj laboraj kondiĉoj kaj malaltaj salajroj. La polico atakis kaj dispelis la protestantojn. Tiuj ĉi virinoj establis sian unuan laboran unuiĝon (sindikaton) 2 jarojn poste, en la sama monato. Sed tiu evento estas nur mito, kaj havas neniun historian realon.

**Simbolo**

En multaj landoj la simbolo de la internacia tago de virinoj estas branĉeto de akacio.

**Historio**

Protestoj okazadis la 8-an de marto dum la sekvantaj jaroj kaj Usono konsideris la 8-an de marto kiel virinan tagon. La 2-a Internacia Socialista Virina Konferenco en 1910 (en Kopenhago) akceptis la proponon de Klara' Zetkin', ke ĉiu-jare la 8-a de marto estu dediĉita bataltago por la socia, ekonomia kaj familia egalrajteco de virinoj. La unua Internacia tago de Virinoj en la sekvanta jaro estis granda sukceso kun pli ol unu miliono da partoprenantoj. Tiun sukceson ombrelis tragedio tiumonate, kiam la 25-an de marto 1911 en la incendio en la Fabriko Triangulo mortis pli ol 140 teksaĵlaboristinoj.

La Unuiĝintaj Nacioj oficialigis la tagon en 1977 invitante ĉiun landon en la mondo festi tiun tagon por la rajtoj de virinoj.

**Fonto:** [https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_tago\\_de\\_virinoj](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_tago_de_virinoj)



## La Majstro Mortis!



### La 14-a de aprilo, Mortodatreveno de L.L.Zamenhof

La 14-an de aprilo en la jaro 1917 kaj en urbo Varsovio nia komunumo perdis sian grandan gvidanton, la kreinto de la Internacia lingvo, D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof (Ludwik Lejzer Zamenhof).



Ludoviko Zamenhof mortis dum la unua mondmilito en Varsovio okupita de germanaj trupoj, revante pri la fino de la milito, post kiu li volis kunvoki Esperanto-Kongreson. Sed la mondmilito ne volis finiĝi. Sur la manuskripto kiun L.L.Zamenhof preparis por alvoki la kongreson, li skribis unue, ke la kongreso okazu "en la lastaj tagoj de decembro 1916" en Svisio. Poste li ŝanĝis tion al "en la unuaj tagoj de aŭgusto 1917", kaj finfine li per tremanta mano skribis "post la fino de la milito".

En printempo 1917 la granda milito daŭris. En la lasta tempo de sia vivo L.L.Zamenhof pro siaj korproblemoj devis ne kuŝiĝi, nur sidi aŭ stari. En sia verko Vivo de Zamenhof Edmond Privat priskribas la lastajn momentojn de Zamenhof jene:

*"Ripozi, dormi e kelkajn minutojn! Unu tagon la kuracisto lin permesis momenton. Estis la 14-a de aprilo 1917. Li etendi is sur kanapo. Al la pordo la edzino akompanis la doktoron. Dume li sentis sin pli bone. Fine iom da ripozo, tiom sopirita! ... Sed jam li eksufoki is. Li volis voki. La vo o haltis en lia gor o. Jen alkuris la edzino. i helpis lin residi. Ve! Jam esis bati tiu koro, batinta tiel forte por homaro. Jam venis la ripozo liberiga."*

La lastaj vortoj kiujn skribis Zamenhof estis laŭ la verko de Privat la jenaj:

*"Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero ... ; ke ekzistas iaj le o j en la naturo ... ; ke io min gardas al alta celo..."*

En sia mortotago li estis nur 57-jara. Pro la milito la landlimoj estis fermitaj kaj krom la familio nur varsoviaj esperantistoj povis ĉeesti la enterigon de Zamenhof. Nur iom post iom la informo pri lia morto atingis la esperantistojn dise en la mondo. La verkisto Julio Baghy troviĝis en militkaptiteco en Siberio, kiam li eksciis pri la morto de la iniciatinto de Esperanto li verkis sian faman poemon "La majstro mortis", tamen, ke Zamenhof mem neniam ŝatis esti nomata "majstro". :

*Ne estis mi tie,  
Pre ante plorpie:  
Katenis min sklave Siberio.  
La famon, ne brue,  
Nur poste, malfrue,  
Simile al e o de mortkrio  
Mallonga sciigo alportis:  
„La Majstro mortis!“*

*Sed scias mi sente,  
Ke oni sensente  
Plezurojn pelante babiladis,  
E kiam plorante,  
La erkon portante  
Amaso funebra trapa adis.*



La 14-an de aprilo 1917 LLZamenhof Mortis...

(desegnita Seremo U.Baldeis)



*Mallonga sciigo alportis:  
„La Majstro mortis!“*

*Por ili, jen, homo,  
E malpli—nur nomo  
Sin ka is por iam en la erko;  
Por ni, funebrantoj,  
Por pacbatalantoj  
i gardas kreinton de Mondverko.  
Mallonga sciigo alportis:  
„La Majstro mortis!“*



Ne, kontraŭ ĉiuj tiuj diraĵoj L.L. Zamenhof ne mortis. Li ankoraŭ vivas en la koro de Esperantistoj, en ĉiu vorto de lia kara lingvo, kaj en ĉiu ero de la esperanta movado. Jes por li morto ne estis malapero, lia kreaĵo la Lingvo Internacia, kaj lia memoro en la esperanta komunumo, kiun li mem kreis kaj gvidis por multaj jaroj, gardas nun lin al alta celo.

El artikolo de Libera Folio en 2005-04-14 :  
<http://www.liberafolio.org/2005/persono/zamenhofmorto>

### Herkesin bu güzel yazıyı okuyabilmesi için sözlük


Yazıyı türkçeye çevirmek yerine herkesin okuyabileceği şekilde bir sözlük vermek daha uygun geldi. Sözlüğü daha önceki taleplerden dolayı kelimelerin metindeki sırasına göre değil alfabetik sırada verdik. Sözlük yardımı ile bu güze metni okumaya çalışmanızı öneririz.

akompani	eşlik etmek
al-porti	taşımak, getirmek
al-voki	çağırarak, seslenmek
amaso	kalabalık
ankoraŭ	hala, daha
atingi	ulaşmak
babel-adi	sohbet etme (sürekli şekilde)
bat-inta	vurmuş/çarpmış olan
brue	gürültülü şekilde
ĉe-esti	(bir yerde) bulunmak
celo	amaç
ĉerko	tabut
ĉesi	durmak, bitmek, sona ermek
ĉiu	her bir
dir-aĵo	söylenen şey
dise	ayrı olan
dum	sırasında
dume	sırasında
eĥo	akış, eko
ek-scii	bilmeye başlamak
ek-senti	hissetmeye başlamak
ek-sufok-iĝi	boğulmak, nefessiz kalmak
en-ter-igo	gömülme

ero	parçacık
etend-iĝi	yayılarak uzanmak
fama	ünlü
farm-ita	kapanmış olan
funebr-anto	yas tutan, cenazeye katılan
funebro	cenaze, yas
gardi	korumak
gorĝo	boğaz
gvid-anto	rehberlik yapan
hom-aro	insanlık
iniciat-into	kurucu, başlatıcı
inter-nacia	uluslararası
iom post iom	biraz biraz
jene	aşağıda, işte (zarf)
kanapo	kanape
kara	değerli, sevgili
kaŝi	saklamak, gizlemek
kateni	kelepçelemek
komun-umo	topluluk
kontraŭ	karşı
kre-aĵo	yaratılan şey
kre-into	yaratıcı olan
krom	haricinde
kun-voki	bir araya çağırarak
kuŝ-iĝi	kendisini yatırmak
land-limo	ülke sınırları
leĝo	yasa
liber-iga	serbestiyet/hürriyet veren
majstro	usta
mal-apero	kayboluş
mal-frue	geç
mal-longa	kısa

manuskripto	el yazısı doküman	pri-skribi	tarif etmek (hakkında yazmak)
memoro	hatıra	pro	...'dan dolayı
milit-kaptit-eco	savaş esirliği	rev-ante	hayal ederek (zarf)
mond-milito	dünya savaşı	ripozi	istirahat etmek
mond-verko	dünya çapında eser	ŝati	beğenmek, sevmek, hoşlanmak
mort-krio	ölüm çığılığı	sci-igo	bilgilendirme
morto-dat-reveno	ölüm yıldönümü	sen-sente	hissetmeden
morto-tago	ölüm günü	sente	hissederekten
mov-ado	hareket (bir fikir için yapılan)	senti	hissetmek
naturu	doğa	Siberio	Sibirya
neniam	hiç bir zaman	sin	kendisi, kendisini
nom-ata	adlandırılıyor olmak	sklave	köle şeklinde
okazi	oluşmak, meydana gelmek, vuku bulmak	sopir-ita	özlenen
okup-ita	işgale uğramış olan	tiom	o kadar
pac-batal-anto	barış için savaşmakta olan	tra-paŝ-adi	geçmek (sürekli şekilde)
pel-ante	iterek, öteleyerek	trem-anta	titremekte olan
plezuro	zevk, mutluluk	trov-iĝi	bulunmak
plor-ante	ağlayarak	trupo	birlik (askeri)
plor-pie	ağlamaklı gösteriş	verko	eser
por ĉam	sonsuz kadar	voki	seslenmek
port-ante	taşıyarak		
preĝante	dua ederek		

## Poemoj de Konuralp



Biliyorum,  
internet çağındayım  
fakat bir tren  
tıkır tıkır  
yürüyor kalbimde.  
Ne araçlar değişti çağlar içinde  
ve aracsız yürüdüm  
o kadim insanlar  
sular üzerinde.  
Bilirim  
bilirim de  
yine de  
bir tren düdüğü  
ünler içimde.

Mi scias,  
mi estas en la epoko de interreto  
sed vagonaro  
iras ene de mia koro  
trik trak trik trak.  
Kiom da veturiloj ŝanĝiĝis dum jarcentoj  
kaj eĉ sen veturiloj iris  
tiuj prahomoj  
sur akvoj.  
Mi scias  
jes mi scias  
tamen,  
sonorilo de lokomotivo  
sonoras interne de mi.

Gezginlerin Tanrısı'ydı onunkisi.  
Tıkalıydı artık kulakları  
yerleşiklerin sakız nasihatlerine.  
Bir maceranın neden ve nasıl olamayacağı  
için dizi dizi söylevler  
aslında bir kıskançlığı gizler.  
Tozlanmış ömürler  
görmek istemezlerse  
işe yaramaz binlerce fener.  
Öyle güzel ola ki yolculuk  
düşer dener gezgin.  
Hep düşer ve hep dener

La Dio de vojaĝantoj estis lia Dio.  
Liaj oreloj nun estis blokitaĵoj  
al la maĉgumaj konsiloj de la ekloĝantuloj.  
Seriaĵ prelegoj  
pri kial kaj kiel ne povas esti la aventuro  
fakte kaŝas ĵaluzon.  
Se polvokovritaĵo vivoj  
ne volas vidi tion,  
tiam senutilaĵo estas miloj da lanternoj.  
Tiom bela devas esti la vojaĝo,  
ke la vojaĝanto tamen falas li denove provas.  
Li ĉiam falas kaj li ĉiam provas.





...eltira o el la romano "La proceso" de Franz Kafka

Antaŭ la Leĝo staras pordogardisto. Al tiu pordogardisto venas viro de la kamparo kaj petas pri tio, ke oni enlasu lin en la Leĝon. Sed la pordogardisto diras, ke li nun ne povos permesi la enlason al li. La viro pripensas tion kaj tiam demandas, ĉu li do poste rajtos eniri.

'Estas eble', diras la pordogardisto, 'sed ne nun.' Ĉar la Leĝo estas malfermita kiel ĉiam kaj la pordogardisto paŝas flanken, la viro kliniĝas por vidi tra la pordo internen. Rimarkante tion, la pordogardisto ridas kaj diras: 'Se tio logas vin tiom, tiukaze provu eniri do spite al mia malpermeso. Sed notu: Mi estas potenca. Kaj mi estas nur la plej suba pordogardisto. De salonego al salonego tamen staras pordogardistoj, kiuj estas pli kaj pli potencaj. Jam la aspekton de la tria eĉ mi ne povus elteni plu.'



Tiajn malfacilaĵojn la viro de la kamparo ne atendis; la Leĝo estu alirebla ja por ĉiu kaj ĉiam, li pensas, sed kiam li nun pli zorgeme rigardas la pordogardiston kun ties peltomantelo, lian grandan pintan nazon, la longan maldensan nigran tataran barbon, li decidas tamen prefere atendi, ĝis li ricevos la permeson eniri. La pordogardisto donas al li tabureton kaj permesas al li eksidi flanke de la pordo. Tie li sidas dum tagoj kaj jaroj. Li ofte provas esti enlasata kaj lacigas la pordogardiston per siaj petoj. La pordogardisto ofte iom esplordemandas lin, demandas lin pri ties hejmlando kaj pri multaj aliaj aferoj, sed estas indiferentaj demandoj, kiajn metas grandaj sinjoroj, kaj je la fino li ĉiam diris denove al li, ke li ankoraŭ ne povas enlasi lin. La viro, kiu ekipis sin por la vojaĝo per multaj aĵoj, uzas ĉion, kiel ajn valora ĝi estas, por subaĉeti la pordogardiston. Tiu ja ĉion akceptas, sed dum tio diras: 'Mi akceptas tion nur tial, por ke vi ne supozu, ke vi preterlasis ion.' Dum la multaj jaroj la viro observas la pordogardiston preskaŭ seninterrompe. Li forgesas la aliajn pordogardistojn, kaj tiu unua ŝajnas al li la ununura obstaklo por povi eniri en la Leĝon. Li malbenas la malfeliĉigan hazardon en la unuaj jaroj laŭte, pli poste, maljuniĝante, li nur grumbblas plu al si mem. Li fariĝas infaneca, kaj ĉar dum la multjara studado de la pordogardisto li konatiĝis ankaŭ kun la puloj en ties peltokolumo, li petas ankaŭ la pulojn helpi al li ŝanĝi la opinion de la pordogardisto. Finfine lia vidkapablo malfortiĝas, kaj li ne scias, ĉu vere malheliĝas ĉirkaŭ li, aŭ ĉu nur liaj okuloj trompas lin. Sed certe nun li rimarkas en la malhelo brilon, kiu neestingeble penetras el la pordo de la Leĝo. Nun li ne plu vivos longe. Antaŭ lia morto kolektiĝas en lia kapo ĉiuj spertoj de la tuta tempo en unu demando, kiun li ĝis nun ankoraŭ ne metis al la pordogardisto. Li mansignas al la pordogardisto, ĉar li ne plu povas rektigi sian rigidiĝantan korpon. La pordogardisto devas profunde kliniĝi al li, ĉar la altodiferenco ŝanĝiĝis tre malfavore al la viro.

'Kion vi nun do ankoraŭ volas scii?' demandas la pordogardisto, 'vi estas nesatigebla.'

'Ĉiuj aspiras ja la Leĝon', diras la viro. 'Kial okazis, ke dum tiuj multaj jaroj neniu krom mi deziris la enirpermeson?' La pordogardisto rimarkas, ke la viro jam proksimas al la fino, kaj por ankoraŭ atingi la orelojn de la surdiĝanto, li kriegas al li: 'Tie ĉi neniu alia krom vi povis ricevi la enirpermeson, ĉar tiu enirejo estis destinita nur por vi. Mi nun iros kaj fermos ĝin.'

*PS: La romanon mia edzino kaj mi us tradukas en Esperanton. is la fino mankos nur plu kelkaj pa oĵ...*

El la blogo de Hans-Georg Kaiser **retmagazino KARAPACO-PANORAMO**

<http://karapacopanoramo.blogspot.com/2016/01/kafka-antau-la-lego-eltirajo-el-la.html>



Mia edzino Ineke kaj mi, pensiitaj en Nederlando, por la unua fojo konataĝis kun Turkujo komence de la jaro 2006. Estis en februaro, malvarma, pluva kaj neĝa, kaj ni sopiris la sunon. Mia frato kaj lia edzino havas la saman ideon kaj kune ni serĉis eblecon por plenumi nian deziron. Rapide ni trovis interrete sunferiojn en Turkujo kaj ni mendis vojaĝon al nekonata destino, ie en tiu lando. Kiam ni eniris la aviadilon ni nur iomete sciis kion ni komencis. Vojaĝo al la suno, tutcerte!

Nokte ni alvenis al tute nekonata flughaveno, eniris aŭtobuson kaj forveturis al ien en la turka Riviero. Estis nur en la aŭtobuso kiam ni sciiĝis la nomon de la hotelo kie ni estus kondukataj: SerapSu en iu urbo Konaklı, proksime de Alanya. Tie ni loĝus dum 10 tagoj.

Kaj tio ne trompis niajn esperojn, kontraŭe. La hotelo, kvankam sufiĉe malplena, estis bonega, la manĝaĵoj, bufede, perfektaj kaj la vetero..jes, multe da suno kaj cirkaŭ 20 gradoj en februaro – ne decis grumbli! Ni eĉ povis ekkuŝi en la suno sur la plaĝo kiu estis ĉe la hotelo.

Ni rapide informiĝis pri la sistemo de la "dolmuş" busetoj kaj ankaŭ lui aŭton ne kaŭzis problemon. Evidente ni unue ĉirkaŭrigadis en la proksima Konaklı: ĉarma, sed tre trankvila ekster la sezono. Ni ricevis sugestojn por viziti Side kaj Alanya kaj lu-aŭto rapide portis nin tien. Side, sia mirinda malnova haveno kaj templa komplekso nin subite multe impresis kaj ankaŭ poste ni ĝin multfoje vizitis. Kaj evidente Alanya, ĝia fama imponega kastelo el la 12a jarcento, la Ruĝa Turo kaj la historia ŝipkonstruejo, la bela plaĝo (kvankam ni ne estas plaĝamantoj) ambaŭflanke de la urbo. Tie ni havis unuan impreson de la Turka vivo, almenaŭ en tiu ĉi parto de la granda lando.

Parto de la vojaĝo estis vizito de Pamukkale, la naturfenomeno kun la blankaj terasoj kaj la antikva urbo de Hierapolis. Kun granda plezuro ni tie havis bonegan libertempon kaj post 10 tagoj malfeliĉe ni devis reveni je la sama vojo al Nederlando.

La daŭrigo..

Jam dum la tempo de nia reflugo ni havas la ideon ke ni ŝatus reveni en Turkujo kaj, eble, kiu scias, loĝi tie de tempo al tempo. Logika sekvanta paŝo estis la vizito en oktobro 2006 de speciala borso pri duaj hejmoj en Utrecht (NL), kie en la turka sekcio ni parolis kun granda nombro da prezentantoj de ĉiaj projektoj en la regiono de Antalya ĝis Alanya. En la komenco de 2007 ni decidis partopreni en unu de tiuj projektoj. Atendantaj ĝian finiĝon ni decidis vendi nian hejmon en Nederlando kaj elmigri al Turkujo. Ekde septembro 2009 ni luis apartamenton en Oba/Alanya kaj nur komence de la lasta jaro 2015 ni povis ekloĝi en nia nova duetaĝa apartamento, ankaŭ en Oba, kiu intertempe estas parto de la urbo de Alanya.

La sekvanta fojo mi klopodos skribi iom pri Alanya.

Kiu mi estas?

Mia nomo estas Fons Doomen, mi naskiĝis en Tilburg, Nederlando, do nun estas 73jara. Jam en la baza lernejo mi aŭdis pri esperanto, mi interesiĝis kaj iom poste memlernis ĝin. Mi akiris la elementan diplomon. En Tilburg dum kelkaj jaroj estis klubo de esperantistoj, sed bedaŭrinde ĝi ne vere floris kaj fine estingiĝis. Mi ĉiam ligiĝis kun Esperanto kaj en la lasta jaro eĉ ricevis diplomon de UEA pri 50jara membriĝo, sed mi ne vere aktivis. Post mia alveno en Turkujo mi rimarkis, ke en tiu ĉi lando apenaŭ ekzistas e-movado kaj tial mi multe ĝojas pri la aktiveco de kelkaj Istanbulaj esperantistoj kaj la organizo de la Mezorianta Kunveno en Ürgüp.

**Fons Doomen**  
**Alanya, 2016-02**



## LA LASTA MILITA ELEFANTO

de SHEN SHIXI

La primitiva arbaro en Xishuangbanna de Yunnan-provinco en la sudokcidento de Ĉinio estas hejmo de elefantoj. En militaj jaroj tie estis brava trupo el elefantoj.



Foje en kontraŭagresa batalo en 1943 la militaj elefantoj kuraĝe batalis tondre muĝante kaj peze batis la malamikojn, sed bedaŭrinde ĉiuj elefantoj estis trafitaj de kuglo de malamikoj. Post la batalo oni fosis grandan kavon en longo kaj larĝo de pli ol 20 metroj por enterigi la mortintajn elefantojn kaj starigis antaŭ la tombo steleon kun skribo "Centelefanta Tombo".

Dum transportado de la mortintaj elefantoj oni rimarkis, ke unu virelefanto estas spiretanta, kaj ĝiaj kolo kaj piedo estis grave vunditaj. Per ĉaro kun 8 ĉevaloj oni portis la elefanton en vilaĝon. Ĝi estis la unusola elefanto

transvivinta la batalon, kaj ĝia nomo estis Gaaso.

Marte de 1969 mi transloĝiĝis en la vilaĝon kaj vidis Gaason. Ĝi aĝis jam pli ol 50 jarojn. La kolo estis forte oblikva kaj la buŝo neniam fermebla. La vundita piedo ŝajne estis malpli longa ol la aliaj, kaj ĝi iris lame. Ĝi preskaŭ ne havis harojn, kaj la du dentegoj estis tegitaj de dika tavolo da flava substanco. Tamen ĝi estis milita elefanto, meritoplena batalanto. La vilaĝanoj respektis ĝin kaj neniam laborigis ĝin. Ĝi vagadis en la vilaĝo, kaj la vilaĝanoj donis al ĝi jen bananojn jen akvon.


Mi konatiĝis kun maljuna vilaĝano Bonondino, kiu prizorgadis la elefanton. Kaj sekve mi amikiĝis kun Gaaso.

Tri jarojn post mia alveno al la vilaĝo, Gaaso fariĝis pli kaj pli kaduka kaj ĝia apetito pli kaj pli malbona. Ĝi dormis sub arbo tra la tuta tago. Bonondino bone sciis la elefanton kaj diris al mi: "La suno subiros, la fajro estingiĝos, kaj Gaaso foriros." Post kelke da tagoj Gaaso rifuzis manĝi kaj kuŝiĝis. Mi longe skuis ĝian rostron kaj ĝi malfacile malfermetis la okulojn kaj ekrigardis min. Mi pensis, ke ĝi troviĝis en duonsveno.

Unu matenon, kiam mi preterpasis la ŝedon de Gaaso apud la draŝejo, mi miris, ke Gaaso subite rekonsciiĝis kaj troviĝis en ekscitiĝo. Ĝiaj okuloj estis ruĝaj, kaj vidinte Bonondinon, ĝi tuj kriis mallaŭte kaj direktis sian rostron al la subtegmento de la ŝedo, kie amasiĝis diversaj objektoj. Ĝi ekscitite piedbatis la teron. Bonondino neglektis ĝin, kaj ĝi koleriĝis kaj frapegis per sia rostro la foston de la ŝedo kaj sin puŝis kontraŭ la tabula muro de la ŝedo. La ŝedo preskaŭ falis. Bonondino ne povis kvietigi ĝin kaj petis min iri supren kaj transpasi al li la objektojn en la subtegmento por vidi, kion la elefanto volas.

En la subtegmento estis duonkorbo da rizosemoj, du faskoj da maizospikoj kaj kelke da jutsakoj. Mi pensis, ke ĝi iom resaniĝis kaj volis manĝi, kaj mi ĵetis al ĝi la du faskojn da maizospikoj. Sed ĝi prenis kaj elĵetis ilin el la ŝedo. Mi do pasigis al Bonondino la korbon, sed antaŭ ol li prenis ĝin, Gaaso faligis ĝin kaj tretadis ĝin en kolero. Mi ĵetis al ĝi la jutsakojn, kaj ĝi disŝiris ilin per la dentegoj.

Do en la subtegmento restis nenio alia krom malnova bambua mato. Sed Gaaso ankoraŭ muĝadis rigardante min. "Pli serĉu, kio alia tie restas," min urĝis Bonondino. Mi levis la maton kaj vidis ion similan al selo, grandan kaj pezan, ŝajne el ledo de sovaĝa bovo, kaj kovritan de dika tavolo da polvo. Mi piedbatis ĝin malsupren kaj je tio miraklo okazis: Vidante la aĵon, Gaaso tuj kvietigis, forblovis la polvon kaj longe karesis ĝin per sia rostro. Ĝiaj okuloj splendis, kvazaŭ renkontante malnovan amikon.



"Ho, ĝi volas la selon," iluminiĝis Bonondino. "Tio estis uzata dum la batalo. Kiam ni reportis ĝin de la bataalkampo, ĝi havis sur si la selon. Por kuraci ĝiajn vundojn, ni demetis la selon kaj ŝovis ĝin en la subtegmenton. Pasis jam 26 jaroj, kaj mi antaŭ longe forgesis la aĵon, sed Gaaso bone memoras ĝin."

Gaaso prenis la selon per sia rostro, metis ĝin sur sian dorson kaj signis al ni, ke ni ligu ĝin. Post granda peno ni sukcesis fiksi la selon.

La selo havis sur si truojn de kuglo, ŝajne ankaŭ sangajn makulojn. Krome ĝi odoris strangan miksan odoron el ledο, polvo kaj sango. Meze de la selo estis kuseno en formo de lotusfloro, garnita per arĝentaj tintiletoj kaj abrikotkoloraj kvastoj. Kvankam malnova, ĝi aspektis impone. Kun la selo sur la dorso, Gaaso aspektis brave.

"Kial ĝi volas surhavi la selon?" mi mire demandis.

"Ŝajne tio ne estas bona aŭguro," diris Bonondino, kuntirante la brovojn en melankolio. "Mi pensas, ke ĝi foriros de ni al la elefanta tombo."

Mi aŭdis pri elefanto. Ĝi estas saĝa besto kaj povas antaŭsenti sian morton, krom se ĝi estas trafita de violenta morto. Ĉirkaŭ duonmonaton antaŭ sia morto, elefanto forlasas la kamaradojn kaj iras sola al la mistera elefanta tombo en malproksima loko. Ĉiu grego havas sian difinitan tombon. Tio estas aŭ profunda fendo pro efloreskado, aŭ granda karsta kaverno, aŭ enfalinta kavo pro tertremo. Ĉiu membro de la grego iras al la sama tombo, malgraŭ kien ajn ĝi migris. Pli mirinde estas, ke elefanto ĉiam povas trafte trovi, pere de mistera forto, la tombon de sia grego, eĉ se ĝi neniam vidis la tombon.

Ĝusta estis la supozo de Bonondino: Gaaso estis forlasanta la vilaĝon por iri al sia eterna ripozejo. Ĝi ĉirkaŭiris la vilaĝon trifoje por esprimi sian dankon al la vilaĝanoj, kiuj savis ĝin kaj vivtenis ĝin dum 26 jaroj. La vilaĝestro ligis al ĝia kolo blankan tukon el gazo kaj ĉirkaŭvolvis ĝiajn kvar piedojn per nigra ŝtofo. La vilaĝanoj junaj kaj maljunaj prezentis al ĝi bananojn, sukerkanojn kaj rizbulojn, sed ĝi nur trinkis iom da akvo.

La suno subiris, la ĉielo griziĝis, kaj Gaaso adiaŭis la plorsingultantajn vilaĝanojn.

Disiĝis la homoj, kaj Bonondino gape rigardis en la direkto de foriro de la elefanto. Li diris al mi: "Ni sekvu ĝin kaj trovu la tombon..."

Mi komprenis, ke li volas akiri elefantajn dentegojn kune kun mi kiel kompano. Korpo de mortinta elefanto facile putras en tropika plubarbaro, sed la dentegoj ĉiam brilas per alloga koloro. Preskaŭ en ĉiu elefanta tombo oni povas trovi dekojn da dentegoj, kaj elefanta tombo estas fakte granda trezorujo. Ŝajne la elefantoj travidas la koron de la homoj avidaj je iliaj fortaj incizivoj kaj prenas kiel sian tombon la lokon malfacile atingeblan en profunda primitiva arbaro.

Bonondino divenis mian heziton kaj diris: "Ni prenu dentegojn de aliaj elefantoj, sed ne tiujn de Gaaso, kaj tiel ni ne rimorsos antaŭ Gaaso."

Mi aprobis lian ideon havi elefantajn dentegojn sen riski ofendon al Gaaso.

Ni ekiris kaj post nelonge kuratingis Gaason, kiu solece sin trenis sur mallarĝa vojo kondukanta profunden en montaron. Mallumiĝis, kaj la blanka tuko en signo de funebro sur ĝia kolo fariĝis celo de nia observo. Gaaso iris malrapide pro lameco, sed ne haltis, kaj en la sekvanta mateno ĝi atingis Daluo-riveron.

"Mi rememoras, ke antaŭ 26 jaroj ni elakvigis Gaason ĉi tie," Bonondino diris, montrante testudforman rifon en la rivero. "Dank' al tiu rifo Gaaso estis haltigita en torento, alie la torento forportus ĝin kaj ĝi certe dronus."

Do ĉi tie estis la batalkampo antaŭ 26 jaroj!

Gaaso vadis en la rivero kaj venis al la rifo. Ĝi karesadis per sia rostro la krudan rustkoloran rifon. Post longe ĝi levis la kapon kaj surdige muĝis al la leviĝanta suno ĉe la horizonto. Ĝi fariĝis tute aliaspekta, ĝia korpo pufiĝis kvazaŭ enblovita per aero, la haŭto de ĝiaj kvar piedoj estis streĉita kaj la okuloj radiis per vigleco. La muĝado fariĝis impone trista, kaj fiŝoj terurite elsaltis el la akvo.

Leviĝis ĉe ni respekto: Ĝi estas elefanto, sed antaŭ sia morto ne forgesis la teron, sur kiu ĝi batalis sangoverŝe.

Ni sekvis ĝin ĉirkaŭ unu horon kaj ĝi subite haltis sur milda sunflanka montodeklivo.

"Jes, ĉi tie estas tombo de la pli ol 80 elefantoj kaj tie estas steleo," Bonondino diris mallaŭte.

Mi rigardis en la direkto de lia fingromontro kaj vidis steleon en herbaro, kaj sur la steleo estis apenaŭ legebla skribo "Centelefanta Tombo".

Ĉu Gaaso volis...? Mi ne kuraĝis supozi, ĵetis rigardon al Bonondino kaj trovis, ke ankaŭ li kuntiris la brovojn pro konfuziĝo.

Gaaso venis al la steleo, haltis sur ebena terpeco plena de herboj kaj ekfosis per la du dentegoj. Ĝi fosis de mateno ĝis posttagmezo kaj sukcesis fari malprofundan ovalan kavon. Ĝi glitis en la kavon kaj daŭrigis fosadon elĵetante teron per la rostro. Ni rigardis ĝin de malproksime kaj vidis, ke ĝia korpo malleviĝis colo post colo. La suno subiris kaj la luno leviĝis, sed ĝi ankoraŭ daŭrigis la fosadon.



En noktomezo ni jam ne povis vidi Gaason kaj nur aŭdis mallaŭtan sonon de ĝia fosado, kaj la elĵetado de tero fariĝis pli kaj pli malrapida. Post la unua kokeriko regis silento.

Kun granda pacienco mi kaj Bonondino atendis tagiĝon kaj nur tiam ni havis la kuraĝon iri al la kavo por esplori. La kavo profundis 3 metrojn. Gaaso kuŝis en la fundo kun kapo turnita flanken kaj rostro spirale ĉe genuo. Unu okulo nefermita rigardis al la ĉielo.

Gaaso mortis. Ĝi ne iris al la malproksima mistera tombo de siaj prapatroj. Ĝi fosis kavon apud la "Centelefanta Tombo" kaj eterne ripozis kune kun siaj kunbatalantoj. Ĝi trovis indan lokon por veterana milita elefanto.

La kavo odoris putran odoron, kaj ni povis vidi la skeletojn de elefantoj entombigitaj antaŭ 26 jaroj. En la ruĝa tero ŝajne vidiĝis blankaj elefantaj dentegoj. La dentegoj de Gaaso fariĝis brilaj pro frotado kun tero dum la fosado. En la matena lumo la dentegoj brilis per digna rebילו. Bonondino diris en honto: "Se ni forprenos ĉi tiujn dentegojn, nian novan domon trafos incendio kaj nian bovon mortigos tigro!"

"Jes, nin trafos fatalo!" mi diris. Rigardante la dignan korpon de Gaaso, ni sentis nian animon turpa.

Mi kaj Bonondino kune replenigis la kavon per la tero elĵetita de Gaaso kaj firmbatis ĝin...

Elĉinigita de WANG SHIRONG

Fonto: <http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/literaturo/01.htm>



### KIO ESTAS LA AKUZATIVO? (parto 1)

La akuzativo tre simple estas la sufikso "-n", kiu estas aldonata al la rekta objekto de la transitiva verbo por montri ĝin

Transitiva verbo estas tiu verbo per kiu la subjekto pasas la agon al la objekto. Kontraste la netransitiva verbo ne havas objekton kaj la ago de ĝi trafas la subjekton.

Klasika ekzemplo por netransitiva verbo estas:

Hundo dormas.

Hundo dormas sub la tablo.

Hundo dormas trankvile sub la tablo.

Hundo dormas trankvile sub la tablo ĉe la angulo de la ĉambro.

Granda hundo dormas trankvile sub la tablo ĉe la angulo de la ĉambro.

ktp.

Sed kiel vi vidas estas neniu rekta objekto por la verbo "dormi" en ĉi tiuj frazoj. La ago de la verbo trafas nur la subjekton kiu estas "hundo". Do tiu, kiu dormas estas la "hundo", la aliaj aldonaĵoj nur priskribas pli bone la agon aŭ la okazaĵon.

Klasika ekzemplo por la transitiva verbo kaj la akuzativo estas:

Hundo amas kato-n.

Granda hundo amas nigra-n kato-n. [1]

Nia granda hundo amas la nigra-n kato-n de la najbaro.

ktp.

En ĉi tiu frazoj la subjekto ĉiam estas la "hundo" kiu per la verbo "ami" pasas la agon al la objekto kiu estas la "kato". La sufikso "-n", aŭ pli bone ni diru la "akuzativo" montras tiun rektan objekton de la verbo. Do se ni ŝanĝas la ordon de la vortoj la signifo de la frazo neniam ŝanĝas:

Hundo amas katon.

Hundo katon amas.

Katon amas hundo.

Katon hundo amas.

Amas hundo katon.

Amas katon hundo.

Sed ĉu ni bezonas la eblecon ŝanĝi la vortordon en Esperanto? Jes, ĉar Esperanto estas lingvo por ĉiuj popoloj kiuj parolas malsimilajn lingvojn kun malsimilaj trajtoj. Plue ŝanĝante la vortordon oni povas pli bone esprimi kaj emfazi pli forte tion, kion oni celas.

Estas aliaj formoj de la akuzativo, kiuj ne rilatas rekte al la verbo. Pri tiujn formojn ni parolos poste en alia numero de nia revueto.

---

[1] Kiam la objekton priskribas adjektivo, tiam ankaŭ la adjektivo prenas la saman sufikson, kaj se la objekto estas pluralo, ambaŭ la adjektivo kaj la objekto estas pluralaj kaj la sufikso fariĝas "-jn". Ekzemple: "nigra-n kato-n" kaj "nigra-jn kato-jn".



## Portreto - Stano Marček



Stano MARČEK, oficiale Stanislav MARČEK (naskiĝis la 5-an de januaro 1953 en Slovakio) estas slovakia esperantisto, instruisto, eldonisto, membro de Akademio de Esperanto kaj laŭreato de Premio Degučí.

Marček eklernis Esperanton kiel 12-jaraĝa en bazlernejo. En sia junaĝo li aktivis en la slovakia junulara esperanto-movado kaj gvidis kursojn de Esperanto. Li fondis, gvidis kaj aligis al TEJO organizon Junaj Esperantistoj en Slovakio (JES), kiu poste malfondiĝis, sed en 2003 estis fondita ĝia posteulo, Slovakia Esperanta Junularo.

Marček studis pri aparatoj kaj aŭtomatigaj teĥnikoj. Post studado li laboris en paperoproduktado, tapetoproduktado kaj celulozoproduktado kaj gvidis fakon pri

elektroniko.

En la 1980-aj kaj 1990-aj jaroj li laboris kiel manaĝero de sukcesa Ĉeĥoslovakia roka muzika grupo Team. Krom aliaj aferoj li prizorgis eldonon de ilia unua albumo ankaŭ en Esperantlingva versio kaj preparis Esperantan turneon. Ekde 2010 li estas prezidanto de Slovakia Esperanta Federacio. Li ankaŭ estas membro de Akademio de Esperanto.

Marček laboras kiel redaktoro de Juna Amiko (gazeto de ILEI), Esperanto aktuell (gazeto de Germana Esperanto-Asocio) kaj ekde 2013 helpas pri Esperantisto Slovaka (organo de Slovakia Esperanta Federacio), kiun li redaktis en 1985-1995. Antaŭe li estis redaktoro de la revuoj Esperanto (2002-2013) (organo de UEA), Esperantista Vegetarano (1982-1997) kaj Heroldo de Esperanto (2000-2001) kaj kunlaboris kun Monato.

Marček posedas propran eldonejon en kiu li eldonas eldonaĵojn de si mem kaj de aliaj aŭtoroj. Al lia verkaro apartenas fama lernolibro Esperanto Per Rekta Metodo kiu en 2014 estis tradukita al 34 lingvoj. Li aŭtoras ankaŭ kolektojn de krucvortengimoj, instru-amuzaj libroj, sonlibroj kaj metodikaj materialoj. Al la slovakia li tradukis kaj eldonis libron La Zamenhof-strato de Roman Dobrzyński, redaktis kaj eldonis la libron Bona Espero, idealo kaj realo de la sama aŭtoro.

En 1977 li akiris diplomon de instruisto de Esperanto kun aprobo por gvidi kursojn laŭ asociaj ekzamenoj ĉe Eduard Vladimír Tvarožek kaj Magda Šturová-Seppová. Li gvidis kursojn de diversaj niveloj dum SET-Lančov kaj InPaSem en Ĉeĥio, SELKO, Somera Esperanto-Studado (SES) en Slovakio, Someraj E-kursoj en Finnlando, Pollando, Germanio, Francio (TAKE/IKEF), Svislando (KCE, La Chaux-de-Fonds), Hispanio (Internacia Semajno), Nov-Zelando (Oceania Kongreso) kaj aliaj. En 1982 organizis kaj direktoris Internacian Junularan Kursejon en Bardejov, Slovakio.

Pro sia agado estis Marček plurfoje premiita per diversaj premioj. Pro "instruado de Esperanto, informado pri Slovakio en esperantista medio" li estis en 2008 deklarita Esperantisto de la jaro en Slovakio. En 2010 li estis enlistigita en Panteono de Edukado.net. En 2014 laŭ decido de estraro de UEA estis al li aljuĝita Premio Degučí, konata ankaŭ kiel "esperantista pacpremio" pro "longtempa agado kiel instruisto de Esperanto en multaj landoj kaj pro lia ĵurnalisma agado kiel redaktoro de multaj Esperanto-gazetoj". Solena transdono ne okazis dum publika aljuĝo, dum la 99-a Universala kongreso, pro malĉeesto de Marček, sed dum KAEST 2014 kun transdono de la premio de Stefan MacGill.

Stano Marček estas edziĝinta, patro de unu filino (naskiĝinta en 1980) kaj unu filo (naskiĝinta en 1983).

### ESPERANTO PER REKTA METODO

Riĉe ilustrita lernolibro de Esperanto por komencantoj La lernolibron akompanas didaktika materialo: KD de Stano Marček, taŭga por kursoj kaj memlernantoj. Modela elparolo (voĉlegitaj Esperantaj tekstoj de la libro, Ĝis nun ĝi aperis en 27 lingvoj: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovakia, Esperanta, greka, nederlanda, irlanda, rumana, germana, dana, litova, serba, vjetnama, luksemburga, hungara, kroata, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina.

La lernolibron akompanas didaktika materialo: KD taŭga por ĉiuj lingvaj versioj de la lernolibro, la E-tekstoj estas identaj kaj 500 Instruaj Bildoj A5 por kursgvidantoj (ankaŭ sur KD). Pliaj informoj kaj mendoj ĉe: [www.ikso.net/stano.marcek](http://www.ikso.net/stano.marcek); [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com).



Verkoj

\* **Esperanto per rekta metodo.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Martin: La aŭtoro, 2006. 110p. 25cm. ISBN 8096958186. Komplete ilustrita 22-lectiona kurso, tradukita al pli ol 30 lingvoj.

\* **DVD Aŭdo-vida konversacia kurso de Esperanto por progresintoj.** Ampleksa 8-lectiona lernomaterialo kun koloraj bildoj, stereaj sonoj kaj printeblaj tekstlibretoj por la lernantoj. Stano Marček. Martin: La aŭtoro, 2006. Taŭga por per-komputila aŭ TV/DVD-aparata instruado kaj grandekrana projekciado.

Taŭga distribo por E-kluboj.

\* **107 krucenigoj en Esperanto.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková kaj Stano Markovič. Martin: La aŭtoro, 2008. 88p. 27cm. ISBN 9788089312061. Diversgrandaj kruc(vort)enigoj.

\* **KD 107 krucenigoj en Esperanto.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková kaj Stano Markovič. Martin: La aŭtoro, 2008. 88p. Diversgrandaj kruc(vort)enigoj. Kompaktdisko kun printeblaj kaj projekcieblaj krucenigoj en jpg- kaj pdf-formatoj. Kun permeso de la aŭtoro printi aŭ projekcii la krucenigojn (por kursanoj aŭ klubanoj), resp. por represi ilin en Esperantaj gazetoj. La aŭtoro rezignis pri la aŭtoraj rajtoj.

Fonto: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Stano\\_Mar%C4%8Dek](https://eo.wikipedia.org/wiki/Stano_Mar%C4%8Dek)

## Mirinda Lviv



Antaŭe estis la E-renkontiĝoj nomitaj "Aroma de Jalto" sed post la invado de Krimeo per la rusoj, tiujn renkontiĝojn nun oni organizas en urbo Lviv de Ukrainio. Jen la anonco:

### Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej mirindan urbon de Ukrainio!

Tie la duan fojon okazos E-renkontiĝo "Mirinda Lviv-2016" inter la datoj de 29-a de aprilo kaj 3-a de majo. Riĉa historia arkitekturo, multenombraj muzeoj, neforgeseblaj kafejoj, florantaj kreskaĵoj, proksimaj karpataj

vidindaĵoj inspiras vian animon kaj iĝos neforgesebla evento de la jaro. Lviv ĉiam allogas multajn homojn, kiuj strebas alten. Famaj verkistoj, poetoj, pentristoj vizitis tiun-ĉi ĉarman urbon, por krei siajn ĉefverkojn. Venu kaj komprenu, kial Lviv estas nepre vizitenda almenaŭ unufoje en la vivo, des pli en la gastama kaj amika Esperanto-etoso.

Bonvolu noti, ke civitanoj de Eŭropa Unio ne bezonas la vizon, por eniri Ukrainion!

Volodimir Hordijenko, Kijivo: tel. +38 (097) 4403172, [volodomir@ukr.net](mailto:volodomir@ukr.net).

<http://aromajalto.ukrainio.org.ua/home>

## BET-52



**Litova Esperanto-Asocio (LEA) invitas al la tradiciaj 52aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-52), kiuj okazos la 2–10an de julio 2016 en Birštonas. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.**




Somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri la Esperanto-movado en la baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, scienc teknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun la litovaj lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj.

<http://sezonoj.ru/2015/09/litovio-5/>

## La Eta Princo

Antoine de Saint-Exupéry

### La eta princo



"Verŝajne ne necesas rekomendi aŭ prezenti ĉi libron, jam tradukitan al plej diversaj lingvegoj, lingvoj kaj lingvetoj de la mondo. Oni tuj mendu ĝin antaŭ la baldaŭa elĉerpiĝo de la 3a esperanta eldono, cetere belege presita, ĉar, krom niaj karaj zamideanoj, avide ĝin aĉetos ankaŭ la miriadoj da etaprinckolektistoj ambiciantaj havi po unu ekzempleron de absolute ĉiu aparta lingva versio de la verko.

Ĉu ĝi estas porinfana literaturo? Eble jes. Ankaŭ poradolta. Prefere ni diru ke plej oportune ĝin kunlegu kaj kunĝuu adolto kun infano.

Luj trovas ĝin sentimentalala, eĉ sentimentalaca. Miaopinie, ili malpravas (sed estus laciĝe doni al ili klarigojn). Ĉiufoje kiam mi relegas ĉi majstroverkon nur ŝajne simplan, potence signifohavan, mi trovas novajn aferojn: filozofion, politikon, ironion, poezion...

Ni memoru ekzemple kiel, sur p. 17, la aŭtoro rakontas pri turka astronomo, kies eltrovon de asteroido en 1909 kredis neniu en astronomia kongreso pro lia turka kostumo: "Feliĉe por la reputacio de la asteroido B 612, iu turka diktatoro devigis sian popolon, sub minaco de mortopuno, vesti sin eŭropane. En tre eleganta vesto la astronomo refaris sian demonstracion en 1920. Kaj ĉi-foje ĉiuj samopiniis kun li."

Oni povus eseĭ ankaŭ pri tio ĉu la floroj sur p. 32 estas nur floroj... Sed, nu, sufiĉas... mi ĉesu jam paroli kiel la granduloj..." [re enzo de Jorge Camacho en la katalogo de UEA]

Mi legis la libron dum malnova Esperanto-Sumoo kaj mi povas diri ke ĝi estas tre agrabla, mola kaj kortuŝa romano. Libro de gejunuloj tamen ankaŭ verkita por la plenkreskuloj. La rakonto tuŝas la korojn de plenkreskuloj tra la junulaj pensoj, sentoj kaj kompreno de la mondo. Temas pri kiel serĉi kaj trovi la esencon de la vivo. La romano provas instrui al ni, ke ni ne serĉu per la okuloj, ĉar la okuloj normale estas blindaj, sed ni serĉu per la koro. Tion, kion ni serĉas, estas facile eltrovita en eĉ unu sola rozo aŭ en eĉ iom da akvo. Junuloj kun iliaj simplaj pensoj, imagpovoj, kaj grandaj koroj eltrovas la esencon pli bone ol la plenkreskuloj. Jen kelkaj citaĵoj el la libro:

"Oni bone vidas nur per sia koro, la esenco estas nevidebla per okuloj."

"Homoj kulturis kvin mil rozojn en unu ĝardeno kaj tamen ili ne trovas, kion ili serĉas.

Kaj ja ili povus trovi, kion ili serĉas, en unu sola rozo aŭ en ion da akvo."

"La okuloj estas blindaj, necesas serĉi per la koro."

La libron vi povas libere elŝuti el ĉi tiu ligilo:

<http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20saint-exupery,%20antoine%20de%20-%20la%20eta%20princo.pdf>

## UK 2016 - 101a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra (Slovakio)

La 101-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 23-a kaj 30-a de julio 2016 en urbo Nitra, en Slovakio kaj jam estas kvar aliĝintoj el Turkujo:

S-ino Hanife Aŝçı KADĪFELİ  
S-ro Murat ÖZDİZDAR

S-ro Vasil KADĪFELİ  
S-ro Mehmet Fatih YÜCE





### La eta pianisto (de Briĝ Kotari)

Iam estis knabeto kiu nomiĝis Azul. Li tre ŝatis ludi la pianon kaj revis fariĝi pianisto. Ĉiun dimanĉon li iris al piankurso kaj ĉiun vesperon li ekzercis hejme antaŭ ol enlitiĝi.

Azul bone progresis ĉar li estis tiom diligenta. Foje okazis ke li forgesis purigi siajn dentojn, sed neniam li forgesis ekzerci la pianludadon!

Iun tagon Viki, lia pianinstruistino diris al li, "Azul, morgaŭ vi ludos antaŭ granda publiko. Vi fariĝos pianisto! Viaj fingroj moviĝas kiel sciuro sur la klavaro. Sed io mankas."

"Kio?" Azul volis scii. Li vere deziris fariĝi ne nur bona pianludanto, sed vera pianisto.

Viki ridetis. Ŝi flustris en la orelon de Azul instruistinan sekreton. "Ludu per via koro, ne per viaj fingroj."

Kiel ĉiam Viki elprenis sian skatolon de memgluaĵoj. Azul montris sian manon kaj Viki metis sur ĝin belegan memgluaĵon de papilio.

"Jen, pensu pri tiu papilio, kiam vi volas ludi per via koro," ŝi diris.

Je tiu tago, dum ĉiuj infanoj ludis en la parko, Azul daŭre rigardis sian papilion. Li scivolemis, "Mi kapablas ludi per miaj fingroj, ĉar mi povas movi ilin. Mi povas tuŝi la klavojn de la piano. Kiel mi povas ludi per mia koro? Mia koro ne videblas."

Unuafoje ekde longa tempo Azul enlitiĝis ne ludinte la pianon.

La vesperon antaŭ la koncerto li ne ekzercis, ĉar li ne sciis kiel ludi per sia koro!

Kiam Azul vekiĝis, li volis rigardi la memgluaĵon pri papilio.

"Ho ne! la memgluaĵo malaperis!"

Nun Azul ektimis, terure timis. Li provis ludi la pianon, sed liaj fingroj ne pretis moviĝi! Tamen tio ne malhelpis la montrilojn de la horloĝo moviĝi.

Baldaŭ estis la tempo kiam la koncerto komenciĝos.

La piano estis meze de la ronda scenejo, ĉirkaŭata de vicoj da spektantoj. Azul paŝis sur la scenejon, sidiĝis sur la tabureton kaj dum sekundo fermis siajn okulojn. Memorante la vortojn de Viki li pensis pri papilio.



Silento regis en la koncerthalo, subite Azul aŭdis brueton de flugiloj. Papilio alvenis sur lian ŝultron kaj ekzumis melodion. Liaj fingroj de si mem ekmoviĝis. Lia koro ekludis la kanton de la papilio.

**Prenita de Bukboks**

<http://www.bookbox.com/products/little-pianist?plang=esp>

## Sözlük

Yandaki basit hikayeyi okuyabilmek için sizlere alfabetik sırada aşağıdaki sözlüğü hazırladık. Kolay gelsin...

antaŭ	öncesinde
aŭdi	duymak
baldaŭ	kısa sürede, yakında
bel-ega	çok güzel
bru-eto	alçak gürültü
ĉirkaŭ-ata	çevrelenen
ĉiu	her
daŭre	sürekli
de si	kendiliğinden
dento	diş
deziri	arzu etmek
diligenta	çalışkan
dum	sırasında
ek-de	...'den beri
ek-timi	korkmaya başlamak
ekzerci	egzersiz yapmak
ek-zumi	vızıldamaya başlamak
el-preni	bir şeyden bir şeyi almak, çıkartmak
en-lit-iĝi	yatağa girmek
eta	küçük
fariĝi	olmak
far-iĝi	olmak
fermi	kapatmak
fingro	parmak
flug-ilo	kanat
flustri	fısıldamak
foje	bazen
forgesi	unutmak
hejme	evde
horloĝo	saat
instruistina	öğretmene ait
iun tagon	bir gün
kalv-aro	klavye
kapabli	becermek, kabiliyeti olmak
kiel ĉiam	her zamanki gibi
klavo	tüş (klavyedeki)
knab-eto	küçük erkek çocuk
komenc-iĝi	başlamak
koncert-halo	konser salonu
ludi	oynamak
mal-aperi	yok olmak
mal-helpi	engellemek
manki	eksik olmak
melodio	melodi
mem-glu-aĵo	kendinden yapışkanlı şey

memorante	hatırlayarak
meti	koymak
meze	ortada
montri	göstermek
montr-ilo	göstergeç
mov-iĝi	hareket etmek
neniam	hiç bir zaman
nom-iĝi	adlandırılmak
okazi	olmak, vuku bulmak
okulo	göz
orelo	kulak
papilio	kelebek
paŝi	adım atmak
pensi	düşün
pian-instru-isto	piyano hocası
pian-isto	piyanist
pian-lud-ado	piyano çalma (sürekli)
pian-lud-anto	piyano çalan kişi
preti	hazır olmak
progresi	ilerlemek
provi	denemek
publiko	halk topluluğu
pur-igi	temizlemek
regi	hüküm sürmek
revi	hayal etmek
rid-eti	gülümsemek
rigardi	bakmak
ronda	yuvarlak, dairesel
scen-ejo	sahne
sciuro	sincap
sci-vol-emi	bilmek istemek
sekreto	sır
sekundo	saniye
sid-iĝi	oturmak, kendisini oturtmak
silento	sessizlik
skatolo	kutu
spekt-anto	seyirci
subite	aniden
ŝultro	omuz
tabur-eto	tabure
tamen	buna rağmen
terure	korkunç şekilde
tiom	o kadar
tuŝi	dokunmak
unua-foje	bir keresinde
vera	gerçek
vere	gerçekten
vico	sıra
vid-ebila	görülebilir

## Mallonga Historio de Filozofio (3)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la mallongan historion de Filozofio kun Aristotelo, la lernanto de Platono kaj instruisto de Granda Aleksandro. Aristotelo estis unu el la plej gravaj filozofoj de la historio ĉar sur ĝiaj observoj kaj instruoj baziĝis la okcidenta civilizacio por miloj da jaroj.

Vasil Kadifeli (1959) İstanbul

### Aristotelo

Ne vintras per unu nuboj, ne someras per unu floro". Per tiu frazo Aristotelo volis diri ke per kelkaj minutoj da ĝojo oni ne feliĉas. Por ke oni feliĉiĝu oni bezonas multajn jarojn kaj devas travivi mankojn, do infanoj fakte ne vere feliĉas.

Aristotelo estis lernanto de Platono, kaj Platono lernanto de Sokrato. Sokrato estis bona parolanto, Platono estis bona verkisto, kaj Aristotelo estis bona en ĉio! La unuaj du esploris la mondon nur per abstrakta filozofia maniero, sed Aristotelo estis intereso de ĉiu detaloj ĉirkaŭantaj lin. Bedaŭrinde, ke li nur lasis al ni notojn kaj ne kompletajn verkojn. Tamen ili estas la fundamento de la okcidenta mondo. Li ne nur estis filozofo sed ankaŭ zoologo, astronomo, historiisto, politikisto, kaj li eĉ interesiĝis pri dramo.



Li naskiĝis en la jaro 384 AK en Macedonio kaj post lia studado kun Platono, li fariĝis instruisto de Granda Aleksandro. Poste li malfermis lernejon nomita Lyceum en Ateno kiu fariĝis la tre fama lernejo de la tiam mondo. En la fama pentraĵo de Rafaelo nomita Skolo de Ateno oni vidas Platonon montranta ĉielon al la "Formoj" kaj Aristotelon montranta teren al la mondo antaŭ li. Aristotelo volis malkovri la veron do li ne apogis la teorion de formoj sed li pensis ke se oni volas kompreni iun kategorion de estaĵoj oni volas studi la veran membron de tiu kategorio kaj ne pensi pri la perfekta formo de ĝi.



Ĉiuj filozofoj tiam provis respondi la demandon "Kiel ni devas vivi?" kaj la respondo de Aristotelo estis "Serĉu feliĉon". Sed li ne pensis pri amuziĝo kaj ĝojo. Li parolis pri "eŭdemonio" kiu ne nur signifas feliĉo sed ankaŭ "disvolviĝo" kaj "sukceso" de la homo. Homoj decidas kion ili volas fari kaj fariĝi, do ne lasu la floron en malhela loko, sen akvo, kaj insektoj ne ronĝu ĝin. Li pensis ke homoj havas ian funkciadon en ĉi tiu mondo, do ili devas vivi taŭge ka uzante la fortojn de iliaj cerboj.

Li plue kaj strange pensis ke nia "eŭdemonio" estus influita eĉ de malbonaĵoj post nia vivo. Laŭ Aristotelo la vera demando estis "Kion mi povas fari por altigi la ŝancon de mia eŭdemonio?". Lia respondo estis "En ĝusta tempo oni sentu la ĝustajn sentojn tiam oni kondutos ĝuste kaj tio estas bazita sur kiel oni estis trejnita kiam oni estis infano." Soldato povas fari ĉion por protekti la aliajn soldatojn eĉ li povas endanĝerigi sian vivon sed tio estas "senpripensita kuraĝemo". Kontraŭe alia soldato povas fari nenion kaj kaŝi ĝin ie, tio estas "malkuraĝemo". La taŭga virto estas inter tiuj du punktoj, kaj tiu instruado de Aristotelo stas nomita "La ora mezo".

Aristotelo diris, ke homo estas "politika besto" do, por kunvivado ni bezonas ian sistemon de justeco por subpremi nian malhelan naturan aspekton. Do "eŭdemonio" ankaŭ rilatas al bona kunvivado.

La nura problemo pri Aristotelo estas ke li estis tiel saĝa kaj liaj esploroj estis tiel multampleksaj ke post li homoj pensis ke li estis kaj estos prava por ĉiam. Por multaj jarcentoj sciencistoj kaj filozofoj senpripenseme kredis ke

li estas prava. Sed tiu senpripensemo fakte kontraŭas la instruadon de Sokrato, ĉu ne? Ekzemple li pensis ke se oni lasas pecon de fero kaj pecon de kotono fali, ĉiam la peco de fero atingas la grundon unue do fero falas pli rapide ol kotono. Nun ni scias ke tio malpravas sed tiu estis akceptita ĝis la 18-a jarcento kiam Galileo Galilei faris eksperimenton en la turo de Pizo. Fakte por Aristotelo kredi je la aŭtoritato de aliulo estis tute malakceptema afero. Do, tiu akceptemo de homoj dum jarcentoj tute kontraŭas tiun ideon.

(daŭrigota)

## Internacia Kalendaro

### KIAM, KIE, KIO OKAZAS? - INTERNACIA KALENDARO

pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj!

La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

- \* **Vojaĝu** al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon, kun datoj, nomoj, mallonga priskribo, reteja adreso, ktp!
- \* **Se mankas iu aranĝo**, anoncu kaj registru ĝin senpage!
- \* **Diskonigu**, reklamu la Kalendaron al viaj Esperantistaj amikoj



La Internacian Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto. La Kalendaro funkcias ekde 1996, kaj enhavas jare ĉ. 250 Esperanto-aranĝojn.

**Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro:** <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin: **Szilvási László**, [szilvasi@eventoj.hu](mailto:szilvasi@eventoj.hu)

**Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn!**

## Nova redaktoro por la revuo Esperanto



### Nova redaktoro por la revuo Esperanto: Kaszás Attila

El ses kandidatoj por sekvi Fabrício Valle kiel redaktoro de la revuo 'Esperanto', la estraro de UEA elektis Attila Kaszás (47). Li estas diplomita esperantologo, historiisto, politologo kaj li laboras en Budapeŝto kiel konsultanto kaj manaĝisto.

"Ni estas tre feliĉaj pri la kvalito de la homoj, kiuj proponis sin por tiu grava rolo", komentas la prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes. "Denove nia komunumo montris, kiom da talentoj ĝi daŭre sukcesas nutri. La redaktoro estas ŝlosila ano de nia teamo en la Estraro kaj Oficejo, kaj mi antaŭvidas ke Attila plurflanke kontribuos al niaj laboroj por la renovigo de la Asocio."

Lerninto ĉe la fama kvintaga "Piratfiŝkurso" en 1987, Kaszás tuj aliĝis al la E-Fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto, kaj fariĝis tre aktiva en la junulara movado de la 90-aj jaroj. Estrarano de Hungara E-Junularo kaj TEJO, li kunorganizis multajn junularajn renkontiĝojn kaj trejnseminariojn, rolante kiel la LKK-prezidanto de la 55-a IJK. Dum la renkontiĝoj li ofte verkis kaj reĝisoris humorajn skeĉojn kaj kunredaktis eldonaĵojn. Poste li fondis E-familion, en kiu naskiĝis unu filo.

Profesie, Kaszás laboris ĉe registaraj instancoj, NRO-oj kaj komercaj entreprenoj en diversaj kampoj, kiel ekz. junularpolitiko, ekologia mastrumado kaj internaciaj rilatoj. Li nun faras doktorajn studojn pri elektronika demokratio. Membro de la hungara UNICEF-komisiono kaj estrarano de la Asocio de Eŭropaj Baloto-Spertuloj, li krome ellernis pro pasio dek kvar lingvojn ĝis nun, kaj multe vojaĝis, entute en pli ol kvardek landoj.

Kaszás transprenos la redaktadon de la revuo ekde la maja numero ĉi-jare. "Dum la lastaj semajnoj mi konstante cerbumas pri la revuo, mi estas plena je ideoj, temoj, rubrikoj, artikolopianoj", li entuziasmas. Jam en marto li planas viziti la Centran Oficejon por konatiĝi kun la kolegoj tie.

## Kuiru Kun Mi

Hodiaŭ mi kuiras freŝan pladon, tre bongustan, kiun povas esti proponita kiel ĉefa plado aŭ kiel garnajo.



### INGREDIENCOJ

- 200 gramoj da kikeroj
- 200 gramoj da bruselbrasikoj
- 2-3 terpomoj
- cepo
- kumino
- kareo
- balzama vinagro
- olivoleo

Ni komencas purigi la bruselbrasikojn kaj forprenas la unuajn foliojn, poste ni lavas kaj tranĉas ilin duone. Ni senŝeligas kaj tranĉas la terpomojn en malgrandaj kuboj. Ni tranĉas la cepo en pecoj kaj metas rapide friti ĝin en iom da olivoleo. Kiam la cepo estas moligita, ni aldonas la bruselbrasikojn kaj la terpomojn. Ni aldonas kelkfoje iom da akvo, sed ne tro multe. Kiam la bruselbrasikoj kaj la terpomoj estas moligitaj ni aldonas la kikerojn. Mi uzas kikerojn en la ladskatolo sed vi povas uzi kikerojn sekigitajn (proksimume 12 horoj en malvarma akvo kaj poste vi devas kuiri ilin dum 2 horoj). Ni amalgamigas ĉiujn. Ni saporigas ĉiun kun spicoj. Mi elektis la kuminon kaj iom de kareo. Fine, iom da oleo kaj balzama vinagro.



**KUIRU KUN MI**  
Receptoj de la tuta mondo

(fonto: el la retejo "Kuiru Kun Mi" de Maria Paola Fortuna :

<http://kuirukunmi.com/2016/03/14/salato-de-bruselbrasikoj-kikeroj-kaj-terpomoj/>)

**Bonan apetiton!**

### Sözlük


al-doni	ilave etmek
amalgam-igi	kariştırmak
balzama vinagro	balsamik sirke
bonan apetiton	afiyet olsun
bon-gusta	lezzetli
brusel-brasiko	brüksel lahanası
ĉefa plado	ana yemek
cepo	soğan
duone	yarıya
folio	yaprak
for-preni	alıp almak
freŝa	taze
friti	kızartmak
gam-aĵo	seri, gam
gramo	gram
hodiaŭ	büğün
ingredienco	içerik, muhteviyat
kareo	köri

kikero	nohut
kubo	küp
kuiri	pişirmek
kumino	kimyon
lad-skatolo	teneke kutu, konserve
lavi	yıkamak
mal-varma	soğuk
mol-ig-ita	yumuşatılmış olan
olivoleo	zeytinyağı
peco	parça
plado	tabak, yemek
proksimume	yaklaşık olarak
propon-ita	tavsiye edilen
purigi	temizlemek
sapor-igi	tatlandırmak
sek-ig-ita	kurutulmuş olan
sen-ŝel-igi	kabukları soymak
spico	baharat
terpomo	patates
tranĉi	kesmek



## Karavano al la 102-a UK

Korea Esperanto-Asocio invitis UKon-102 de 2017 jaro en Seulo, Koreio. Kaj La Vojaĝo anoncas novan projekton — Karavanon al Seulo por partoprenantoj de planata kongreso.



Niaj gvidistoj bone parolas esperante, profesie ĉiĉeronas kaj havas sperton ne nur de trajna vojaĝo, sed ankaŭ someraj kaj vintraj vojaĝoj en sovaĝa naturo. Ni havas sperton de vojaĝoj en diversaj landoj de tutmondo, precipe en Azio, do nia nova itinero ne estas hazarda por ni.

Laŭ anticipa plano l karavno itineros laŭ fama Trasiberia fervojo (9298 km), la plej longa fervoja itinero en la mondo. Laŭ baza plano Karavano startos en Sankt-Peterburgo, trapasos nordon de eŭropa parto de Rusio, Uralon, Siberion, vastan azian parton de Rusio preter urboj Vologda, Kirov, Perm, Jekaterinburg, Tjumen', Omsk, Novosibirsk, Krasnojarsk, Irkutsk, Ulan-Ude, Ĉita, Blagoveŝĉensk, Ĥabarovsk al Vladivostoko sur la Pacifika marbordo. El Vladivostoko ni veturos al Koreio per pramo aŭ per aviadilo. Certe, dum 1,5 jaroj, kiuj restas ĝis la Karavano, ĝia itinero povas esti ŝanĝita. Eventuale ni povas vojaĝi trajne nur ĝis lago Bajkalo, restos tie ĉi kaj turnos nin al ĉefurbo de Mongolio — Ulanbatoro, kaj poste veturos al Pekino, Ĉinio. El Ĉinio ni veturos al Koreio per pramo aŭ per aviadilo.

Pritakso de ambaŭ itineroj kaj voĉdonado estas organizota en nia retejo. Atentu ke ni nun pretigas vojaĝon kaj ĉiu pli detala informo aperos ĉi tie tuj post apero, do ne evitu vizitu la paĝon reen por ricevi aktualan informon.

**Pliaj informoj ĉe <http://vojagxo.info/karavano-al-seulo/>**

## Franca Nacia Kongreso 2016 - Marsejlo



**La franca landa kongreso de Esperanto 2016 okazos en Marsejlo de la 5a ĝis la 8a de majo 2016.**

En tiu kongreso, kiu temas pri "Marsejlo, Pordo de Eŭromediterraneo", vi povos partopreni la statutajn kunsidojn de Esperanto-France, kaj aliaj asocioj kiel GEE (Groupement des Enseignants Espérantophones), la Federacio Esperanto-Provence aŭ FKEA (Franca Katolika Esperanta Asocio).

La programo enhavos prelegojn pri Esperanto kaj ĝia movado kaj multaj aliaj temoj rilatantaj al nia kongresa temo : "Marsejlo, Pordo de Eŭromediterraneo". Dum la kongreso, vi ankaŭ povos trapasi la ekzamenojn de FEI (Franca Esperanto-Instituto).

**Aliĝilo : <http://esperanto-france.org/?page=imarseille-eo>**

**Por pli da informoj: <http://esperanto-france.org/nacia-kongreso-2016-marsejlo>**

## Le Monde Diplomatique en Esperanto



La monata revuo "Le Monde diplomatique en Esperanto" <<http://eo.monedediplo.com/>> eldoniĝas nur rete kaj senpage, dank'al interkonsento de la franca "Le Monde diplomatique" kaj la traduka teamo sub gvido de Vilhelmo Lutermano. Se vi deziras esti regule informata pri la aperintaj artikoloj de "Le Monde diplo en esperanto", kiuj estas vere alt-nivelaj, iru al la paĝo "subskribu dissendoliston" <<http://eo.monedediplo.com/liste-info.html>> kaj abonu la inform-leteron.

## Kio estas la Akademio de Esperanto?

# AdE

La Akademio de Esperanto (AdE) estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon, same kiel la ceteraj nacilingvaj Akademioj.

La Akademio de Esperanto estis fondita en 1905 dum la unua Universala Kongreso de Esperanto iom modelite laŭ Franca Akademio, laŭ propono de Ludwik Lejzer Zamenhof, sed tiam sub la nomo "Lingva Komitato". La nomon "Akademio de Esperanto" portis unue supera komisiono de la Lingva Komitato. En 1948 la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kunfandiĝis en unu solan korpon nomatan "Akademio de Esperanto".

La Akademio enhavas Sekciojn, kiuj prizorgas diversajn lingvajn kampojn de la Akademia laboro. La Sekcioj ne estas fiksitaj, sed estas kreataj laŭbezone. Ĉiun Sekcion gvidas Direktoro. Ĉiu Akademiano povas aparteni al pluraj Sekcioj, laŭ sia intereso. Ekzistas jenaj Sekcioj: Faka Lingvo, Gramatiko, Ĝenerala Vortaro, Literaturo, Prononco, Kontrolado de lerniloj kaj Lingva Konsultejo.

La Akademio havas ankaŭ Komisionojn, kiuj plenumas diversajn ne-lingvajn taskojn. Ekde oktobro 2013 ekzistas du Komisionoj: pri Historio de la Akademio de Esperanto kaj pri Homaj nomoj.

Ĉiu Sekcio kaj Komisiono estas gvidata de Direktoro.

La Akademio en 1999 starigis Sekcion Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto, al kiu povas turni sin ĉiu Esperanto-uzanto pri difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon.

La Akademio konsistas principe el 45 membroj, kiuj estas elektataj por periodo de 9 jaroj. Kandidato al membreco devas esti proponita de almenaŭ kvin ekzistantaj Akademianoj reprezentantaj almenaŭ tri malsamajn lingvojn. Kutime temas pri renomaj esperantologoj, Esperanto-pedagogoj aŭ verkistoj. Eminentaj personoj povas esti nomumitaj "korespondaj membroj" de la Akademio.

Por pli da informoj legu: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Akademio\\_de\\_Esperanto](https://eo.wikipedia.org/wiki/Akademio_de_Esperanto)

## Krucvort-enigmo (facila)



### Horizontale:

4. Ejo kie oni kurcacas ne sanajn homojn.

6. Metala stangeto, pinta ĉe unu ekstremo k plej ofte provizita per kapo ĉe la alia, kiun oni enbatas en objektojn cele al fiksado aŭ ligado; Organo de la vidkapablo.

8. Karesformo de onklo, uzata ankaŭ inter amikoj; Teksaĵo el linaj, kanabaj, jutaj, kotonaj fadenoj, interkrucitaj laŭ aparta sistemo.

### Vertikale


3. Hindio

5. Terparto, ĉiuflanke ĉirkaŭita de akvo (pluralo).

8. Sufero kaŭzita pro malpermesita faro kun la celo, ke oni ne faru tion plu.

10. Artefarita hararo, imitanta naturan kaphararon.

12. La silkeca lanugo produktita de planto kaj el kiu oni teksas diversajn ŝtofojn.



La solvo troviĝas en la  
antaŭlasta paĝo

## La vojo

Tra densa mallumo briletas la celo,  
al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
al ni la direkton ĝi diras.  
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
nek batoj de l' sortoj, nek mokoĵ de l' homoj,  
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,  
ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco –  
jen estas la signoj, per kies potenco  
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,  
pri l' tempoj estontaj pensante.  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –  
ni semas kaj semas konstante.  
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, –  
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:  
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
se vi pacience eltenos".

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
velkantajn foliojn deŝiras,  
ni dankas la venton, kaj, repurigataj,  
ni forton pli freŝan akiras.  
Ne mortos jam nia bravega anaro,  
ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,  
obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
al cel' unufoje signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco –  
jen estas la signoj, per kies potenco  
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
atingos la celon en gloro.

L. L. Zamenhof

## KIEL ELSPEZI MIAN MONON ?



Du publikulinoj babilas:

- Diru al mi, kio estas "sekso" laŭ vi?
- Vi vestiĝas, vi iras al trinkejo, vi flirtas kun iu viro. Li aĉetas trinkaĵon al vi. Poste vi dormas kun li. Li forirante lasas iom da mono sur la tablo. Jen kio estas sekso.
- Bone, sed kio estas "bona sekso"?
- Vi vestiĝas, vi iras al trinkejo, vi flirtas kun iu viro. Li aĉetas trinkaĵon al vi. Poste vi dormas kun li. Li forirante lasas multe da mono sur la tablo. Jen kio estas bona sekso.
- Sed kio pri "amo"?
- Ĉu Amo? Ĝi estas juda invento por ke oni ne lasu monon sur la tablo!



### Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuzu 4. dersi ile devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan ve geçen ay her dergiye bu kitaptan bir iki ders koyacağız demiştik. Bu derslerin sonuna ekler, sözlük ve dilbilgisi ile ilgili tanımları vereceğimizi de söylemiştik.

Bir de eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi tanımlarını ya da açıklamalarını bir kere vereceğiz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayacağız demiştik.

Hatılıyorsanız konu içindeki tirelerin (" - ") kelime ön ve arka eklerini gözle görülebilecek şekilde ayırmak için olduğunu, ayrıca birleşik kelimelerin esas kelimelerini gözle ayırtılabilmek için olduğunu söylemiştik.

Eski dergilerinizi atmayın demiştik çünkü önceki açıklamaları her derste tekrar etmeyeceğiz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Bu derste çok fazla kelime yok genelde eski kelimelerin üzerinde bir tekrar. Ayrıca resim de yok, metin önceki dersler ve önceki ders resimlerinin üzerinde tekrar yapıyor. Onun için önceki sayılardaki derslere bakmanız gerekecektir. Anca e önemli konu "tabelvortoj" yani tablo kelimeleri dene 9x5 = 45 kelimelik bir tabloya giriş yapılmakta. Açıklama kısmında tabloyu baştan tam olarak vereceğiz ve sonraki derslerde hep bu tablodan kelimeler çıkacak karşınıza. Çok kolay bir tablo olsa da başta biraz kafa karıştırmakta. Bu tablo aslında Esperanto'nun en önemli ve güçlü yanlarından birisidir. Diğer dillerde bu konuda çok fazla karışıklıklar vardır.

### Leciono 4 - LA FAMILI-O

Roĝer-o hav-as turb-on kaj vip-on.

Li vip-as la turb-on per vip-o.

Ŝila hav-as bird-on en kaĝ-o.

La bird-o kant-as en la kaĝ-o. Ĝi kant-as laŭt-e.

Johano hav-as vagon-ar-on kun tri vagon-oj kaj unu lokomotiv-o.

Johano sid-as en unu vagon-o.

En alia vagon-o est-as kvin sak-oj da gren-o.

La patr-a mus-o port-as pantalon-on, vest-on kaj ĉapel-on.

La du knab-oj port-as pantalon-ojn, sed ili ne port-as ĉapel-ojn.

La patr-in-a muso port-as rob-on, ŝal-on kaj kuf-on.

*Demand-oj kaj Respond-oj*

Ĉu est-as birdo en la kaĝ-o?

Jes, estas bird-o en la kaĝo.

Ĉu la bird-o kant-as laŭt-e?

Jes, la bird-o kant-as laŭt-e.

Ĉu Johano hav-as vagon-ar-on?  
Jes, Johano hav-as vagon-ar-on.

Ĉu la patr-o port-as rob-on?  
Ne, la patr-o ne port-as rob-on.

Ĉu la bird-o port-as vest-on?  
Ho ne! Bird-oj ne port-as vest-ojn!

Kiom da infan-oj hav-as Sinjor-in-o Mus-o?  
Ŝi havas tri infan-ojn.

Kiom da rad-oj havas vagon-o?  
Vagon-o hav-as kvar rad-ojn.

## BELETRA ALMANAKO BA25

La plej freŝa numero la literatura revuo Beletra Almanako (BA25) estas finfine havebla ĉe <http://www.beletraalmanako.com/boao/ba25/index.html>



## TABELVORTOJ

	ne	ŝu	bir	her	hiĉ
ŝey	Kio	Tio	Io	Ĉio	Nenio
kiŝi, belirgin ŝey	Kiu	Tiu	Iu	Ĉiu/j	Neniu
ĉeŝit	Kia	Tia	Ia	Ĉia	Nenia
nasil, ŝekilde	Kiel	Tiel	Iel	Ĉiel	Neniel
yer	Kie	Tie	Ie	Ĉie	Nenie
zaman	Kiam	Tiam	Iam	Ĉiam	Neniam
miktar, adet	Kiom	Tiom	Iom	Ĉiom	Neniom
sebep	Kial	Tial	Ial	Ĉial	Nenial
...ye ait (kimin)	Kies	Ties	Ies	Ĉies	Nenies

n  
j n  
j n  
n (d)

### Aĉıklama

Bu derste ĉok ħnemli bir konuya giriyoruz "tabelvortoj" denen bir tabloya. Toplam 9x5=45 adet kelime var iĉinde. Baŝta karmaŝık gelse de aslında ĉok kolay, sadece buna adapte olmanız gerekiyor. Mı? Mıdır? gibi soru formlarının "Ĉu" kelimesiyle oluŝturulduęunu ħğrendik bu derste. Bunun dıŝındaki tũm dięer soru formları ve cevap ve ifade formları bu tablodaki kelimelerle oluŝturulur Esperanto'da.

Tablo'nun solunda 9 tane farklı anlam gũrũyorsunuz. Tablonun ũst kısmında ise bu dokuz anlamdan oluŝturulan 5 farklı kelime tipi gũrũyorsunuz. Ėrnek olarak ilk satırın anlamı bilinmeyen ŝeyler ve nũtr cinsiyetli kelimeler

için kullanılan "io" anlamına dair. Bu satırda

- İlk kolonda bilinmeyen bu şeyin nasıl sorulduğunu ("Kio...?")
- İkinci kolonda bu şeye nasıl işaret edildiğini ("Tio...")
- Üçüncü kolonda bu şey muğlak olduğunda hangi formu kullanacağımızı ("Io")
- Dördüncü kolonda bu şeylerin tümüne birden nasıl işaret edebileceğimizi ("Ĉio")
- Beşinci kolonda ise bu şeylerden hiç birisine işaret etmek istediğimizde ne kullanacağımızı ("Nenio") görebiliriz.

Tablonun en sağında ise bu kelimelerin çoğul olup olmadıkları ve akuzatif eki alıp alamadıklarını gösteren işaretler var.

- "j" bu kelimelerin çoğul kullanılabileceğini
- "n" bu kelimelerin akuzatif alabileceğini
- sadece "Kie" satırında bulunan "n (d)" işareti ise bu kelimelerin yön belirten akuzatifi alabileceklerini gösterir.

Son bir not olarak ikinci satırda belirgin şeylerin tümünü birden göstermekte kullanılan "Ĉiu" ile "Ĉiuj" farkından bahsedeyim. "Ĉiu" "herbiri" (ing. "each") , "Ĉiuj" ise "hepsi" anlamını verir.

<b>Kelime</b>	<b>Açıklama</b>
alia	diğer, başka
ĉu	soru formu oluşturur, bizdeki "mi?" "midir?" kelimeleri gibi.
da	ölçü belirtir (normalde "de" kullanılan yerlerde kullanılır)
demand-o	soru
Ho ne!	hayır demenin şaşırılmış şekli ("Ah hayır!" der gibi)
kant-as	Şarkı söylüyor ("kant-i" bu fiilin mastar formu)
kiom ...?	kaç...? (tane, adet, ölçü sormak için soru başlatan kelime)
kiom da...?	kaç tane...?
laŭt-a	yükses sesli (sıfat)
laŭt-e	yükses sesli şekilde (zarf)
lokomotiv-o	lokomotif
patr-a mus-o	baba fare
patr-in-a mus-o	anne kedi
respond-o	cevap

## NOT

Hatırlayamadığınız kelime ve ekler varsa, anlamları ve kullanımları için lütfen önceki sayılardaki derslere bakın.

## Esperanto Kurso ĉe Duolingo

### ĈIUTAGE 30 HOMOJ FINAS LA ESPERANTO-KURSON ĈE DUOLINGO

La kvanto de registritaj eklernantoj en la anglalingva, reta Esperanto-kurso ĉe Duolingo jam superis 300.000 homojn. Finstudas ĝin kompreneble nur malgranda parto de ili, sed eĉ tiel ĉiutage ĉ. 30 homoj atingas la finon de la kurso.

Ĉi-jare laŭplane estos lanĉita kurso por hispan-lingvanoj. En postaj jaroj estas planataj kursoj interalie por ruslingvanoj kaj ĉinlingvanoj...

Pli detale vi povas legi en la intervjuo kun Chuck Smith ĉe <http://www.liberafolio.org/>



<https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>

## Printempo

### Alia mondo eblas

Printempe ĝi palpeblas,  
alia mondo eblas.  
Florado estas kri'.  
Sub arbo oni festas.  
Printemp' ribelo estas,  
naturrevoluci'.

Burĝonoj fine krevas,  
el grizo sin eklevas,  
jen kreskas la esper'.  
Je floroj jam palpeblas,  
ke mond' alia eblas  
sur nia tuta Ter'.

Printempkantistoj trilas,  
muziko ekbabilas,  
rondiras kun la vent'.  
Dum la printemp' palpeblas:  
alia mondo eblas,  
tutnova mond' laŭ sent'.

Cezar



Alia mondo eblas (rimpoemo por la printempo) de Hans-Georg Kaiser el la blogo retmagazino **Karapaco-Panoramo**. Jen la ligilo:

<http://karapacopanoramo.blogspot.com.tr/2016/01/cezar-alia-mondo-eblas-rimpoemo-por-la.html>

## La 9-a Mezorianta Kunveno

Oni diras, ke virino  
estas por dormi kune dum longaj vintraj noktoj.  
Oni diras, ke virino  
estas por ludigi ŝin kiel dancista knabo kun naŭ-sonoriloj  
en verda draŝejo.  
Oni diras, ke ŝi estas mia edzino.  
Ŝi estas mia peko kiun mi portas en mia kolo.  
Oni diras, ke ŝi estas knedanto de pasto.  
Oni diras, ke ŝi estas naskanto de infano.  
Nek tio, nek ĉi tio, nek matraco, nek dancista knabo,  
nek edzino, nek peko.  
Ŝi estas miaj brakoj, miaj kruroj, mia kapo.  
Ŝi estas mia infano, patrino, edzino, fratino,  
kara amiko de mia vivo.

Nazım Hikmet RAN



Dum vi estos leganta la aprilan numeron de nia revueto, ni, la aliĝintoj de la 9-a Internacia Mezorianta Kunveno, estos en la belega kaj vidinda urbeto Ürgüp en Kapadocio, en la centro de Anatolio, kune kun fremdaj Esperantistoj, vizitante la vidindaĵoj kaj diskutante pri la disvastigo de Esperanto en nia regiono; la Mezoriantaj kaj NordAfrikaj landoj.

En la venonta numero espereble vi legos rakontojn kaj rigardos fotojn pri nia kunveno.



Solvo de la krucvort-enigma en paĝo 20

**Horizontale:**

4. malsanulejo 6 najlo; okulo 8 oĉjo; tolo

**Vertikale:**

3. Barato 5. insuloj 8. puno 10. peruko 12. kotono



### Kapanış !

Nisan sayısını da sizlere sunabildik. Bildiğiniz gibi eski sayılar web sayfamızın "Dergi" menüsü altındaki linklerden indirilebilir: <http://esperantoturkiye.wordpress.com/>

Bu sayıda rekor kırdık ve 32 sayfaya kadar çıktık ancak bu biraz zorlama oldu. Dergiyi A5 formatında arkalı önlü ve fasikül şeklinde yazdırmak isteyenler için sayfa sayımız 4'ün katları olması lazım, 16-20-24-28-32 gibi. Sonraki sayılarda ideal sayfa sayısında durmaya çalışacağız, kanımızca bu 16, 20 ya da 24.

Ancak önemli olan sayfaların çokluğu değil kalite. Öte yandan dergimiz toplama yazılardan meydana geliyor dolayısı ile bu yazıların kalitesi önemli. Sadece kalite de değil, okunması da önemli, okunmuyorsa dergi çıkartmanın bir anlamı yok. Amaç bu dili sevenlerin hep birlikte okuyabilecekleri kolaydan orta ve nispeten üst seviyeye kadar metinler sunmak. Yazıları Türkçe'ye de çevirip vermek yerine sözlük eklemek daha mantıklı gibi. Amaç Türkçe metinler okutma değil çünkü.

Bu sayıda sizlere Stano Marček'i tanıttık. Kendisi geçen sene Türkçeye de çevirdiğimiz önemli eğitim kitabı "Doğrudan Metod ile Esperanto" kitabının yazarıdır. Bu kitap son yılların en önemli Esperanto öğretici kitaplardan ve ödül aldığı gibi 35'ten fazla dile çevrilmiştir. Satın almak isteyenlere satın alma detaylarını grubumuzda verebiliriz. Kitap UEA ve yazar tarafından satılmakta.

Bu sayıda çok güzel üç okuma parçası aktardık, basit olan "Küçük Piyanist" az daha zor olanlar ise "Son savaşçı fil" ile Kafka'nın "Süreç" adlı romanından bir kesit. Gene arkadaşımız ve Alanya'da yaşayan Fons Doomen'in nasıl Türkiye'ye gelmeye karar verdiklerine dair bir yazıyı yayınladık. Büyü ustamız Zamenhof'un 14 Nisan'daki ölüm yıldönümü için "Usta öldü!" adlı çok güzel bir yazı aktardık. "Son savaşçı fil" ile "Usta öldü!" adlı yazılar çok çok güzel, lütfen okumaya çalışın.

Dergi elinize ulaştığında biz de 1-6 Nisan tarihleri arasında Ürgüp'te 9. Uluslararası Ortadoğu Toplantısında olacağız. Bu sene ne yazık ki politik durumlardan dolayı katılımcı sayısı 30 ile sınırlı kaldı. Sonraki sayımızda bu toplantı hakkında detaylar ve fotoğraflar aktaracağız. Her toplantıda bir ana tema olmasına önem veriliyor ve bu toplantının ana teması olarak Nazım Hikmet seçilmişti. Bunun için geçen sene Nazım Hikmet'in 60 şiiiri ve hayat hikayesi ile iki güzel önsözü Esperanto diline çevirdik ve bir kitap hazırladık. Kitabın yayınlanması kabul edildi ve yakında UEA'nın "Okcidento-Oriento" kitapları serisi altında Mondial yayınevi tarafından piyasaya çıkacak, ayrıca e-kitap formunda da hızlı ve ucuz şekilde de satın alınabilecek.

Bu Toplantı için bir tanesinin senaryosu bizzat Nazım Hikmet tarafından yazılan 1957 Rus-Azerbaycan yapımı film "Aynı Mahalleden İki Delikanlı" ile diğeri 2007 Türk-Yunan ortak yapımı "Mavi Gözlü Dev" adlı filmlere Esperanto altyazı hazırlandı. Filmler toplantı sırasında iki akşam katılımcılara gösterilecek. Bu filmleri toplantıya katılmayan sizler de youtube'tan aşağıdaki linklerden altyazılı olarak izleyebilirsiniz:

[https://www.youtube.com/watch?v=aV\\_8rMscZwk](https://www.youtube.com/watch?v=aV_8rMscZwk)

<https://www.youtube.com/watch?v=BoqgNIPcNOY&feature=share>

Her zaman dediğimiz gibi okumadan ve yazmadan bir dili öğrenemezsiniz. Lütfen okuyun, karalayın, hatta bize gönderin. Okuyucu mektuplarınızı bekliyoruz. Bunlar Türkçe dilinde de olabilir, sizinle birlikte Esperanto'ya da çevirebiliriz.

**Lütfen "ESPERANTO TÜRKİYE" grubumuza katılın:**

<https://www.facebook.com/groups/7121509722/>

**Yazılarınızı facebook grubumuzdan ya da [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com) adresine gönderin.**

**Dergiye ücretsiz abone olmak için bize e-posta adresinizi gönderin.**

*Sonraki sayıda buluşmak üzere...*